

# **Bulgara Esperantisto**

**Aprilo 1989**



## ENHAVO

- 4 Renaskiĝo de SEU
  - 5 Sojle de la Dua Jarcento (Kunĉo Vâlev)
  - 6 Diskuto pri la instruagado de BEA (Dimitâr Mutușev, Penjo Stojanov)
  - 9 Leteroj de korespondamikoj (Marija P. Angelova)
  - 10 Aĉetu en la librovendejo de BEA!
  - 11 Internacia agado
  - 12 Tra la gazetaro
  - 13 Kie, kiam, kio
  - 14 Kiam mi estis ĉefredaktoro... (Donĉo Ĥitrov)
  - 16 Originala verkaro (Marija P. Angelova)
  - 17 Al verkemuloj (Venelin Mitev)
  - 18 Beletro (Ljuben Karavelov)
  - 23 Verda objektivo (Veneta Baleva)
  - 24 Memore al David Sasonov (Emil Ĉirpanski, Ĥristo Gorov)
  - 27 Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto
  - 29 Adresaro
  - 30 Distroj
  - 32 Deziras korespondi
- III Esperanto en Radio

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redaktoroj: Atanas ILKOV kaj Evgeni GEORGIEV

Redakcia konsilantaro: Dimitâr HAĜIEV, Georgi MIĤALKOV, Krâstju Karucin, Kunĉo VÂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MI-TEV.

Adreso de la redakcio: bul. „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86.

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

**Al la kunlaborantoj:** Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

**Abonkondiĉoj:** En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por aliaj landoj 7,80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0,50 lv.

**Por la bezonoj de blindaj esperantistoj** estas organizita registrado de la revuo sur magnetofona bendo.

Sur la unua kovrilpaĝo: Dum paŭzo de la Plenkunsido de CE de BEA, okazinta la 11-an de februaro 1989.

Foto: Kolju MARKOV

## NIA KORESPONDA RETO

*La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ strebas al pli efika kunlaboro fare de siaj kunlaborantoj. Ni ne volas kalkuli nur je hazarda ricevo de materialoj. La redakcio planas la ĝeneralan enĥavon de ĉiu numero kelkajn monatojn anticipe kaj pro tio ni bezonas konstantajn korespondantojn kaj kunlaborantojn, al kiuj ni povu komisi konkretajn taskojn.*

*Perletere ni proponis al la societoj elekti po unu personon kiel nian korespondanton. Ankaŭ ni skribis al niaj konstantaj kunlaborantoj en la lando, petante ilin konfirmi sian deziron plu kunlabori al ni.*

*Bedaŭrinde ĝis nun ni ne ricevis respondojn al niaj proponoj. Interalie, jen estas la nomoj de niaj ĝisnunaj landaj korespondantoj: Manol Ĉolev (Velingrad), Ĥristo Manolov (Polski Trâmbeș), Ljubomir Trifonĉovski (Vraca), Nadeĵda Bosâska (Orjaĥovo), Vera Taskova (Kotel), Andrej Angelov (Samokov), Nadeĵda Ivanova (Pleven), d-ro Mirena Denizova (Loveĉ), Radi Dimitrov (Târgoviște), Geno Manev (Drjanovo), Ivan Apostolov (Petriĉ), Radka Stojanova (Razgrad), Nikola Mitev (Pernik), Angel Mâglov (Gorna Orjaĥovica), Sonja Tiĥova (Gabrovo), Emil Ĉirpanski (Asenovgrad), Virĵinija Kirĉeva (Varna), Petko Arnaudov (Pazarĝik), Minka Kazakova (Dimitrovgrad);*

*Septembre ni planas renkontiĝon kun niaj kunlaborantoj dum la Festo de „Bulgara Esperantisto“ en Velingrad.*

„BE“

### Estimataj eksterlandaj legantoj,

La redakcio de „BE“ informas, ke Vi povas aĉeti jar-kolekton de „BE“ por 1988 kontraŭ 15 gld, aŭ unuopan ekzempleron kontraŭ 2 gld.

Bonvolu sendi la sumojn al UEA, kie ni havas propran konton.

„BE“

**Jaro 58**

**N-ro 4**

# **Bulgara Esperantisto**

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,  
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

Plenkunsido de CE de BEA

## **UNU JARON POST LA KOMENCO**



Pasis unu jaro post la lasta Plenkunsido de Centra Estraro de BEA, okazinta en januaro pasintjare, per kies decidoj komenciĝis la renoviga proceso enkadre de Bulgara Esperantista Asocio. Tiam estis aprobita la nova asocia strukturo, estis plijunigita la estraro de BEA kaj oni donis verdan straton por pli memstara agado de la esperantistaj societoj en nia lando.

Pri la tuta agado de nia Asocio dum tiu jaro „Bulgara Esperantisto“ konstante informis per diversspecaj publikaĵoj. Fakte ĝeneralan pritakson de tiu agado faris per la ĉefartikolo „La stato de nia Asocio“ en numero 12/1988 la prezidanto de BEA Sava Dâlbokov. Ĉiuj gravaj punktoj en la raporto de la Buroo de CE de BEA, prezentita de Sava Dâlbokov dum la Plenkunsido, trovis lokon en la menciita ĉefartikolo.

Do, jen kelkaj donitaĵoj pri la Plenkunsido: Ĝi okazis la 11-an de februaro 1989. Partoprenis 86 membroj de la Centra Estraro de BEA, la membroj de Centra Kontrola Komisiono ĉe BEA, prezidantoj de E-societoj kaj E-domoj pri kulturo, esperantistoj-veteranoj kaj gastoj. En la prezidantaro okupis lokojn la membroj de la Buroo, Nikola Aleksiev — honora membro de UEA kaj honora prezidanto de MEM, la sociagantino Violeta Musakova kaj Jordan Veselinov — ĝenerala direktoro de Entrepreno „Globus“.

La plenkunsidon gvidis prof. d-ro Kiril Popov. Kiel kutime pri la protokolo okupiĝis Petko Arnaudov kaj Vasil Vutov.

Post la raporto de la Prezidanto de BEA Sava Dâlbokov „Pri la ĝisnunaj rezultoj de la renoviga proceso enkadre de Bulgara Esperantista Asocio“ sekvis informo pri la

financa stato de BEA, tralegita de Nikolaj Milev — ĉefo de la financa-ekonomia fako de la Asocio.

## LA ELDIROJ

Dum la plenkunsido la ĉeestantoj aŭskultis 22 eldirojn, kiujn faris 16 membroj de CE de BEA kaj 6 esperantistoj-gastoj. La parolintoj apogis la raporton de la Buroo kaj tuŝis plurajn demandojn de la multflanka asocia agado. La pliparto de la eldiroj estis kritika kaj tio donis al la plenkunsido demokratian spiriton. Sed ne ĉiuj proponoj estis konkretaj, konstruivaj kaj koncizaj kaj „ŝtelis“ de la tempo por eldiroj de aliaj partoprenantoj. La parolon havis jenaj gesami-deanoj:

**Maria Jankova** — ĉefredaktoro de la Unuigita Redakcio ĉe BEA, parolis pri la agado kaj problemoj de la redakcio.

**Petko Arnaudov** — prezidanto de E-societo „Radio“, Pazarĝik: „La asocia kancelario devas certigi tujan respondon al ĉiu veninta leŝero. Regulan informadon bezonas la membroj de la Centra Estraro rilate la laboron de la Buroo. Oni turnu pli grandan atenton al la kvanto kaj kvalito de niaj lernolibroj, al la programoj por diversaj lingvaj kursoj, al la demandoj por la ekzamenoj!“

**Belka Beleva** — prezidantino de la Virina Sekcio ĉe BEA, atentigis pri nesolvitaj demandoj lige kun la strukturo kaj agado de la Virina Komisiono ĉe BEA kaj pri la lastaj sukcesoj de la Bulgara Esperanto-Teatro.

**Dimitâr Dimitrov** — prezidanto de Bulgara Esperanto-Junularo, parolis pri pli serioza rilato kaj pli da komprenemo al la agado de la junaj esperantistoj en nia lando.

**Hristo Tonev** — prezidanto de E-societo „Vekiĝo“ en Ŝumen, alvokis al organizo de standoj pri E-literaturo en librovendejoj de la grandaj urboj, laŭ la ekzemplo de la esperantistoj en Ŝumen.

**Jordan Veselinov** — ĝenerala direktoro de Entrepreno „Globus“, rakontis pri la agado de entrepreno, kiu fakte subvencian asocion.

**Maria Toleva** — direktorino de IEK, parolis pri iuj nekonataj flankoj de la agado de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica.

**Nejko Nejkov** — sekretario de la E-Domo pri Kulturo en Stara Zagora, tuŝis la agadon de la Domo.

**Nikola Nikolov** — vicprezidanto de la E-Domo pri Kulturo — Sofio, kritikis kelkajn flankojn el la agado de BEA: manko de Esperanto-emisio en Radio Sofio, de E-versioj de kelkaj bulgaraj revuoj, krokodilado dum E-aranĝoj. Laŭ li bezonas perfektigon la strukturo de BEA kaj la ordo en la asocia kancelario.

**Rumen Bukov** — prezidanto de E-societo „Kulturo“ en Smoljan, prezentis siajn konceptojn por plua disvolviĝo de la agado en IEK-Pisanica.

**Maria Taŝeva** — sekretario de Bulgara MEM-sekcio, dividis siajn impresojn pri la laboro de la Virina Sekcio.

**Dimitâr Todorov** el Târgoviŝte proponis ŝanĝojn en la Statuto de BEA.

**Ljubomir Trifonĉovski** el Vraca, membro de la Komisiono pri Internacia Agado, parolis pri pli efektiva planado de la internacia agado de BEA.

**D-rino Mirena Denizova** — vicprezidantino de E-societo „Espero“ en Loveĉ, esprimis sian kontentecon pro la kritika spirito de la plenkunsido kaj parolis pri la kondiĉoj por ripozo kaj lernado en IEK-Pisanica.

**Dimitâr Petkov** — estrarano de E-societo „Espero“ en Gorna Orjaĥovica, alvokis al pli da atento al la E-societoj kaj parolis pri la bezono de pli modernaj lernolibroj, destinitaj speciale por esperantistoj de konkreta aĝo.

**Elena Stojkova** — sekretario de la E-Domo pri Kulturo en Burgas, alvokis al organizo de pli interesa laboro en la societoj.

**Mariana Elenova** — organizanto en Bulgara E-Muzeo, parolis pri la valoro de la materialoj konservataj en la Bulgara E-Muzeo kaj alvokis al ĉiuj, kiuj posedas malnovajn E-dokumentojn, librojn kaj aliajn kulturajn valoraĵojn, ligitajn kun Esperanto, transdoni ilin por la kolekto de la muzeo.

**Ivan Peev** el Sofio — membro de CE de BEA, esprimis opinion, ke estas tro reduktita la etata aparato de BEA.

**Nikola Uzunov** — Haskovo, prezidanto de E-societo „Prof. Asen Zlatarov“, tuŝis diversajn demandojn lige kun la societaj buĝetoj kaj eksterlandaj vojaĝoj de niaj esperantistoj.



**Kunĉo Vâlev** — prezidanto de la Kultura Komisiono ĉe BEA, parolis pri la renovigo de BEA.

**Nikola Aleksiev** donis altan pritakson de la laboro de la plenkunsido, emfazante ke ĝi donas pritakson de la plej malfacila periodo de la renovigo — la komenca. Li parolis pri kreo de pli intimaj rilatoj inter la estraro kaj la membroj de BEA, pri plivigliĝo de la societa aktivado kaj pri la neceso de pli oftaj plenkunsidoj de CE lige kun la antaŭstaranta 42-a Kongreso de BEA en 1990.

**Petâr Todorov** — membro de CE de BEA, esprimis sian opinion koncerne la ŝanĝojn en la Statuto de BEA kaj lige kun la internacia agado de BEA.

La prezidanto de BEA Sava Dâlbokov ĝeneraligis la pridiskutitajn problemojn kaj respondis al iuj demandoj.

## LA PROGRAMO

Lige kun la Kompleksa Programo pri Plua Renovigo kaj Perfektigo de BEA-agado, disdonita al la ĉeestantoj antaŭ la komenco de la Plenkunsido, parolis la ĝenerala sekretario de BEA Dimitâr Papazov —

prezidanto de la Komisiono pri la Proponoj kaj Projektodecidoj. Eble ni devus citi la plej gravajn momentojn en la Programo. Oni antaŭvidas organizon de la sekvanta nacia E-kongreso, pli fruktodonan kunlaboradon kun publikaj organizaĵoj, konkretan helpon al la E-societoj.

Internaciskale oni planas organizon de internaciaj E-aranĝoj en Bulgario, partoprenon en E-aranĝoj eksterlande, kunlaboradon kun UEA, MEM kaj aliaj internaciaj E-organizaĵoj, funkciigon de firmao „Esperantoturist“.

## LA DECIDOJ

Fine la Plenkunsido akceptis jenajn decidojn:

1. Aprobas la raporton kaj la Programon kune kun la faritaj aldonoj kaj rekomendas al la E-societoj, sekcioj ĉe BEA kaj al ĉiuj bulgaraj esperantistoj konsideri ilin en sia agado.

2. Akceptas la raporton pri la faritaj dum 1988 elspezoj kaj la proponitan buĝeton por 1989.

3. Rekomendas al la E-societoj, E-Dojmoj pri Kulturo kaj al la sekcioj ĉe BEA



Fotoj: Kirilka SAVOVA

okazigi la jarkunvenojn, dum kiuj oni pri-traktos sian agadon, en la spirito de la fari-taj dum la Plenkunsido konkludoj, kaj de la akceptita kompleksa programo.

4. La Plenkunsido malfondas la Sekreta-riaton kiel organon de CE de BEA.

5. La Plenkunsido liberigas kiel

membrojn el siaj vicoj Angel Todorov — eksa ĝenerala direktoro de IEK — (Interna-cia Esperanto-Kursejo) kaj Leonid Senj el Veliko Târnovo, pro damaĝo al la intereso- de la Asocio. Angel Todorov estas liberigita ankaŭ el la vicoj de Bulgara Esperantista Asocio.

Nepre menciindas la agrabla, pure espe- rantista atmosfero, kiun donis al la paŭzoj dum la Plenkunsido la bone aranĝita foto- ekspozicio de la membroj de ILEF, la malgranda ekspozicio de Bulgara E-Mu- zeo, kie troviĝis ankaŭ la pokalo „Fyne“, al- juĝita al BEA de UEA pro aktiva E-agado, la stando de la Unuigita Redakcio ĉe BEA, kie oni vendis E-lernolibrojn, vortarojn, librojn, revuojn.

Vespere la partoprenantoj en la Plenkun- sido kaj la gastoj ĝuis la spektaklon de Bul- gara Esperanto-Teatro „Fabelo pri kalpa- koj“ de Panĉo Panĉev. Post la spektaklo la prezidanto de BEA Sava Dâlbokov salutis la aktorojn kaj enmanigis la Oran Medalon de BEA „100 jarojn Esperanto“ al la direk- toro de BET Nikolaj Uzunov, al la arta gvi- danto Gertruda Lukanova kaj al la aktoro Teo Jurukov.

Maria JANKOVA

## RENASKIĜO DE SEU

La 23-an—25-an de januaro 1989 en Moskvo oka- zis la longe atendita 3-a Konferenco de ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj). Ĝin partoprenis pli ol 200 delegitoj el la tuta lando. La ĉefa problemo estis, kiel revivigi la daŭre agoniantan ASE. Tamen la reviviĝo ne okazis. Anstataŭe refondiĝis la iam fama SEU (So- vetrespublikara Esperantista Unio), kies funkciado es- tis perforte ĉesigita en 1938.

Same kiel la antaŭa, la nuna SEU agos tute mem- stare, kunlaborante partnere kun ĉiuj sovetiaj kaj eks- terlandaj instancoj kaj institucioj havantaj komunajn celojn kun SEU. La celoj de SEU estas: popularigi Es- peranton, aktive uzi ĝin por interproksimiĝo de la po- poloj, por garantio de tutmonda paco, por solvo de ekologiaj kaj aliaj aktualaj internaciaj problemoj.

La estraron de SEU eniris aktivuloj vaste konataj ne nur en Sovetio, sed ankaŭ eksterlande. Kiel prezidanto de SEU estis elektita Vladimir Samodaj, kiel vic-prezi- dantoj V. Aroloviĉ, A. Gonĉarov, A. Kazakov, B. Kolker, S. Kuznecov, A. Melnikov.

A. MELNIKOV,  
vicprezidanto pri internaciaj kontaktoj

## RADIO POLONIA — 40-JARA

En elektronika erao de sputnika televido kaj video- aparatoj, la radio ankoraŭ ne perdis sian gravecon kiel plej urĝa informilo. Tiu komunikilo estas bone uzata en nia movado. — ekde 1922, kiam estis faritaj la unuaj provoj pri Esperantaj disaŭdigoj en Nov-Jorko (Usono) kaj Londono, ĝis nun, kiam ekzistas dek tri radiostacioj elsendantaj en Esperanto.

Unu el la plej aktivaj — Radio Polonia, la 4-an de aprilo j. k., festas sian 40-jariĝon. Per siaj aktualaj kaj majstraj raportaĵoj, skizoj kaj informoj ĝi prezentas Pollandon al la eksterlanda esperantistaro — pasinto, nuntempo kaj estontaj aspiroj de la pola popolo. Kun- laborantoj de Pola Radio ĉeestas dum universalaj kongresoj, festivaloj kaj aranĝoj.

La ĵurnalistoj el Pola Radio ofte informas pri la bul- gara esperantista movado. Ni povas danki pri emociaj raportaĵoj el Bulgario de s-ro Andrzej Pettyn.

La redakcianoj de „Bulgara Esperantisto“ elkore gratulas siajn polajn kolegojn okaze de la jubileo kaj esperas, ke nia kunlaboro daŭros plu.

„BE“

## ALTNIVELA SEMINARIO

# Sojle de la Dua Jarcento

En decembro 1988 en GDR okazis tre interesa altnivela seminario sub la titolo „Sojle al la dua jarcento: Esperanto — lingvo kaj parolantaro. Kion konservi, kion ŝanĝi?” sub la aŭspicio de UEA. Organizanto: Esperanto-Asocio en GDR. Loko: Ahrenshoop, sur la bordo de Balta Maro, kun belegaj plaĝoj, somere plenplenaj de ripozantoj.

La seminarion partoprenis 36 reprezentantoj de gravaj movadorganoj kaj instancoj kiel la Akademio de Esperanto (AdE), UEA, TEJO, la Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI), la Internacia Informa Centro por la Terminologio (Infoterm, Vieno), unuopaj landaj asocioj. Aparte bone estis reprezentita AdE: la prezidanto d-ro Andre Albault (Albo) el Francio, la vicprezidantoj d-ro Werner Bormann (FRG) kaj Josimi Umeda (Japanio), d-ro Krause (GDR) — membro. UEA estis reprezentita de sia ĝenerala direktoro Simo Milojeviĉ, ILEI — de sia prezidanto Edward Symoens.

Dum la 4 seminariaj tagoj estis faritaj 20 interesaj kaj tre valoraj prelegoj pri diversaj temoj; post ĉiu — viglaj debatoj.

Speciale elektita redakta komisiono sub la prezidanteco de d-ro Detlev Blanke pretigis la konkludajn rekomendojn de la seminario, dividitajn en 5 kategorioj. Ĉi-sube mi citos kelkajn, kiuj laŭ mi estas aparte interesaj kaj aktualaj por la esperantistoj en nia lando.

### Lingvistikaj demandoj

1. AdE pli ol ĝis nun vivu en sia publiko kaj publikigu pri si.

2. Okazu aktiva kunlaborado de la akademianoj kaj de aliaj esperantologoj kun neesperantistaj instancoj kiel „Infoterm”, universitataj esplorcentroj k. a.

### Strukturaj kaj movadologiaj demandoj

1. UEA prenu sur sin la kunordigan rolon de la laboro de diversaj E-centroj tra la mondo.

2. UEA estu konsiderata kiel servo-centro por la tutmonda esperantista komunumaro, tiel ke malaperu la malkontento kaj izoliteco de multaj esperantistoj. Samcele UEA klopodu disvastigi la taskaron de esperantistoj vaste tra la mondo, kunlaboru kun la landaj asocioj kaj kun la fakaj asocioj por administraj servoj, por interna kaj ekstera informado.

3. Transpaga problemo estas grava bremsilo de internacia kunlaborado, tial UEA klopodu trovi taŭgan solvon, ekz. per kolektado de netranspagipovaj valutoj por komuna eldonado de libroj k. s.

### Priservaj demandoj en la E-movado

1. Oni plialtigu la nivelon de servoj al la membroj (akurateco), ĉar nekontentigaj servoj estas ofte la ĉefa kaŭzo de foriro de membroj kaj perdo de gravaj laborfortoj.

2. Bibliotekoj estas niaj trezorejoj, tial ni dediĉu apartan atenton al la kompletigo, ĝisdatigo kaj kunlaborado inter landaj kaj fakaj bibliotekoj.

3. Daŭre ni flegu kontaktojn kun esperantistoj ekster Eŭropo kaj helpu al ili laŭ diversaj praktikaj metodoj.

4. Aparte ni direktu atenton al la junularo.

5. Oni provu ligi la uzadon de E-o kun fakaj celoj, tiel ke E-o fariĝu fonto de scioj por la esperantistoj.

### IV. Edukaj kaj informaj demandoj

1. Oni plivigligu la edukadon en nia movado. Edukado rilatas ĉefe al la kreskigo kaj trejnado de bonaj instruantoj de E-o kaj taŭgaj movadorganizantoj.

2. Oni sisteme daŭrigu la esploron de pli efika informado por disponigi al ĉiuj aktivuloj materialojn ĉiutagajn kaj tiucele starigu „Centron pri Informado kaj Dokumentado”.

3. La disponeblaj komunikiloj estu mobilizitaj por trafa informado al la ekstermovadaj medioj.

4. Oni starigu konstantan kadran edukistemon ne nur en TEJO, sed ankaŭ en UEA, tiel ke la Movado povu transdoni la taskojn de generacio al generacio.

5. Oni kultivu la eblecojn transporti diversajn kulturajn valoraĵojn tra la mondo kaj tiel klopodu iel konstrui internacian kulturon pere de E-o.

### V. Demandoj pri scienca aplikado

1. Oni ebligu pli vastan disvolviĝon de la fakaj organizoj kaj vaste informu pri ilia agado.

2. Oni alvoku lingvistojn kaj aliajn specialistojn al kunlaboro kun esperantistaj samfakuloj rilate komunan studadon de koncernaj problemoj.

3. Oni instigu pli fortan fakan agadon jam en la junulara movado, ekz. inter diversfakaj studentoj.

4. Oni subtenu naciskalajn kaj internaciajn sociologiajn esplorojn pri la E-movado.

5. Oni kuraĝigu kaj organizu plurajn historiajn esplorojn, ekz. pri zamenhofologio, laborista E-movado k. s.

Kunĉo VĀLEV

## INTERNACIAJ ARANĜOJ

De la 20-a ĝis la 30-a de junio 1989 en Pisanica, Bulgario okazos Internacia Muzika Seminario.

Prelegos prof. d-ro St. Ĝuĝev, D. Terziev kaj aliaj muzik-spertuloj.

Matene oni lernos kantojn, vespere oni koncertos.

Ni invitas ĥorestrojn, kantgrupojn, geĥoranojn kaj kantemulojn el la tuta mondo.

Por pliaj informoj turnu vin al: D. Terziev Sofio, tel. 66-62-14.

La 24-an kaj 25-an de junio

1989 Fervoja Esperanto-klubo „Prospero” organizas Internacian Fervojistan E-Renkontiĝon „Verda Semaforo” en Sofio.

Pliajn informojn petu ĉe: Nikolina Jotova, Sofio, ĵk. Druĵba, bl. 99, vh. B, et. 2 ap. 23. Telefonoj: ofica 843-36-32, hejma 76-69-54.

## *Pri la instruagado de BEA*

Pri ĝi vere okupiĝas la Komisiono pri Instrua kaj Scienca Agado (KISA). La artikolo „Gravaj problemoj de la Esperanto-instruado“, publikigita en n-ro 11 de revuo „Bulgara Esperantisto“ montras:

unue, ke la revuo estas malfermita por aktualaj kaj interesaj temoj kaj samtempe ĝi trovis sian ĝustan lokon en la nuna periodo de renovigo

due, ke KISA serĉas novajn manierojn por ekiri laŭ nova vojo kaj profiti la diskoniĝon por atingi al pli alta celo.

Vere, la artikolo tuŝas tre gravan problemon de la bulgara Esperanto-movado, kiun la Komisiono povas solvi nur altirante la estrarojn de la E-societoj, aktivulojn-specialistojn kaj nepre per la helpo de la kursgvidantoj mem. Tiu artikolo engaĝas la leganton kaj vekas diversajn pensojn. Ekzemple, ĉu estas necese, ke oni turnu tiom da atento al la ekstera flanko de la instruprocedo — posedo de atestiloj kaj diplomoj. Mankas, ekz. faktoj, ke s-no Penju Stojanov sen diplomo pri instrurajto malbone gvidis la kurson. Estas malfacile, tamen la Komisiono devas havi impresojn, ĉu la kursoj de P. Stojanov fiaskas, ĉar li ne posedas diplomon aŭ malgraŭ tio li produktas bonajn esperantistojn. La samo validas ankaŭ pri la kursgvidanto en Ruse.

KISA unua publikigas sian dokumenton „Strategio de la eksterlerneja Esperanto-instruado“ kaj rompas la glacieron. Ni devas sincere gratuli KISA pro tiu iniciato.

En ĉi tiu „Strategio“ tamen mankas aŭ ne estas plene solvitaj iuj problemoj.

1. Ekzemple, io okulfrapa. La instrukomisiono pretendas esti ankaŭ scienca. Sed kial scienco ne trovis sian lokon en la „Strategio“? Pro kio oni subtaksas la „Esperantopedagogion“? Neniu alia okupiĝos pri ĝi, tial KISA devas kuraĝe orientiĝi al E-pedagogio.

2. En aliaj siaj dokumentoj KISA konsta-

tas, ke en la praktika laboro de instruistoj kaj kursgvidantoj mankas konvenaj instruhelpiloj (filmoj, bildoj, diapozitivoj). Ĉu tiu serioza problemoj devas resti forgesita?

3. El la dokumento ne videblas ĉu KISA interesiĝas kiamaniere oni organizas kaj gvidas la instruadon de Esperanto en aliaj landoj, metodoj: intensa, rapida, sugesta k. a. Ĉu en nia lando oni ne povus utiligi videokasedojn ankaŭ en la instruado de Esperanto?

4. Laŭ mi, meritas ke ni turnu atenton al punkto 6, kie oni antaŭvidas, ke „kontraŭ la subskribintoj estos aplikataj sankcioj“. Tio vere estas ankoraŭ restaĵo de la malnova ordona-burokrata metodo de laboro. Ni supozas, ke temas pri miskompreno. Anstataŭ dankon pro plenumita tasko kaj gvidado de kursoj, oni punos la kursgvidanton, pro tio, ke li ne posedas atestilon pri instrurajto.

5. Sendube, granda estas la rolo de la kursgvidantoj por plialtigo de la lingvoni-velo de ĉiuj membroj de BEA. Sed erare estas, kiam oni deziras de ili posedon de diplomoj kaj atestiloj, kaj ne turnas atenton al ilia kapablo instrui kaj produkti esperantistojn. Tio estas natura talento. Korekte estus, se per ekonomiaj rimedoj oni insistas, ke la kursgvidantoj mem deziru diplomigi.

6. Tre grava kaj serioza estas la demando pri „korespondaj kursoj“. Sed ĝi ne koncernas la gekursanojn kaj la geinstruistojn. Tio estas alia formo de instruado kaj kiel aparta sistemo devas esti ĝustigita en alia dokumento. Eble en punkto 9 oni devas mencii tion.

7. Se KISA desegnas la strategion de la instruado, tiam neniu rajtas forĵeti la fakan (profesian) instruadon. Nun la Turista Esperantista Sekcio ĉe BEA strebas organizi specialajn kursojn por turistoj. Jam de kelkaj jaroj gesamideanoj Nikola Nikolov kaj



Stefka Ĉenkova gvidas „turistajn kursojn“. Tiu sperto ŝajnas esti popularigata kaj aplikata ankaŭ en aliaj sferoj aŭ profesioj: kooperativanoj, kuracistoj, komercistoj k. a.

8. En la nuna periodo de renovigo, ni ne devas forgesi ankaŭ la Internacian Esperanto-Kursejon. Ĝi devas specialiĝi kiel renoma institucio kun specialaj taskoj por perfektigo de la geesperantistoj el Bulgario kaj aliaj landoj. Jam IEK, devas pro-

poni novajn programojn ellaboritajn surbaze de tute moderna koncepto. La riĉeco de instruformoj devas varii de mallongdaŭraj ĝis longdaŭraj kursoj, de simpozioj ĝis kolokvoj ktp. KISA devas zorgi pri sia ido — IEK, kiu fariĝu forta institucio en la kompleksa instruprocedo. Ankaŭ IEK povas ludi kaj plenumi la rolon de scienca fako en la sistemo de BEA.

Dimităr MUTUŜEV

## VIZAĜE AL LA VERO

Kun granda intereso mi tralegis la ĉefartikolon „Gravaj problemoj de la Esperanto-instruado“ en numero 11/1988 de „Bulgara Esperantisto“.

Mia opinio pri tiu artikolo estas, ke ĝia aŭtoro, de kiu dependas la Esperanto-instruado, taksas la deziratan kiel realaĵon. Alimaniere mi ne povas klarigi al mi la fakton, ke oni daŭrigas aserti, ke en la lando estas sufiĉe da instrurajtaj kursgvidantoj, kaj ke eblas, ke esperantistoj, kiuj posedas diplomon de tria grado kaj bone regas la lingvon, ne rajtas instrui Esperanton. Tamen ĝuste KISA, kun prezidanto Violin Oĵanov, havas je sia dispono sufiĉe da ciferoj pri ĉiu lernoĵaro: kiom da kursoj okazis en la lando, kiom da instrurajtaj kursgvidantoj diplomiĝis, kiom da aliaj kursgvidantoj instruis Esperanton. Ekzemple en 1986/87 lernoĵaro (laŭ tabelo disdonita de septembro) al la partoprenintoj en la konferenco okazinta la 22-an en la lando funkciis 239 kursoj. 17 el la kursgvidantoj posedas diplomon de dua grado, 77 — de tria grado, 14 ne notis sian gradon de lingvoposedo kaj nur 91 posedas diplomon pri instruado. Plue, analizante la ciferojn, oni konstatas, ke 67 el la instrurajtaj kursgvidantoj estas en Sofio, kaj por la provinco restas nur 24. Jen tio estas la vero, kiun oni devas bone scii. Antaŭ tiu vero ni ne devas fermi la okulojn. De ĉiuj 400 instrurajtaj kursgvidantoj nur 91 instruas Esperanton. Do kie estas la ceteraj, kiom da rimedoj oni elspezis por ili, kaj pro kia kaŭzo ili ne instruas Esperanton?

En punkto 7 de la sama artikolo la aŭtoro rekomendas, ke ĉiu societo zorgu havi je sia dispono minimume du instrurajtajn, kursgvidantojn, sed li intence prisilentas, en kiom da societoj en la lando ne estas eĉ unu instrurajta kursgvidanto. Li prisilentas ankaŭ la fakton, ke ne ĉiuj societoj povas organizi kursojn eĉ kun kursgvidantoj, kiuj posedas diplomon de tria grado. Mi proponas, ke oni kontrolu (kaj montru la ciferojn!), en kiom da societoj mankas eĉ unu instrurajta kursgvidanto. Tio bone pruvos, ĉu ni sufiĉe prizorgas la disvastigon de Esperanto.

Post la konferenco en 1986 CE de BEA eldonis cirkuleron, per kiu oni sciigis, ke estonte CE de BEA permesos al personoj, kiuj posedas trian gradon, gvidi kursojn. Mi demandas, kial oni ne konsideras tiun ĉi decidon, kiu kaj kiam nuligis ĝin? Do kion signifas la fakto, ke en la Tarifo por la honorarioj oni fiksis ankaŭ honorarion por neregulaj kursgvidantoj?

Ni devas starigi ankaŭ alian demandon: Kiu, por kiaj cirkonstancoj kaj kun kia konscienco subite decidis elimini ĉiujn kursgvidantojn kun tria instrugrado, malgraŭ ke ili estas pli multnombraj ol la instrurajtaj kursgvidantoj, kiel montras la ĉi-supre cititaj ciferoj. Krom tio ĉiuj tre bone scias, ke nome ili estas la homoj, kiuj longe kaj obstine laboris por altiro kaj kreo de novaj esperantistoj. En kiu alia fako de la asocia agado oni rilatas tiamaniere al la kadroj? Ni evidente devas memori al iuj forgesemaj samideanoj, ke en ĉiuj sferoj de

la socia vivo en similaj situacioj oni rilatas taktoplene, utiligante la eblojn de la kadroj.

En punkto 3 de tiu artikolo la aŭtoro rekomendas, ke 90% de la gekursanoj en unua grado transiru en la duan. Ankaŭ tiu rekomendo estas nura bondeziro. Kial oni ne informas per ciferoj kiom da gekursanoj, kiuj finis unuan gradon, transiras en la duan? Nome tio donos realan bildon pri la efektifeco de la kursoj, kaj aparte de la diversaj kursgvidantoj. En la sama punkto klariĝas sufiĉe bone, ke KISA ne scias kiom malfacile oni varbas gekursanojn por unua grado. Nome pro tio la kursojn por unua grado devas gvidii homoj, kiuj povas gajni iliajn animojn kaj korojn kaj kultivi la Esperantan ideon en ili.

Nun en la tempo de renovigo kaj aŭtonomio, necesas ke CE de BEA donu pli grandan liberon al la societoj, kiuj memstare devas zorgi pri altiro de gekursanoj kaj instruistoj (kursgvidantoj) ne nur laŭ diplomoj, sed laŭ la rezultoj, kiujn ili donas.

Nun, kiam iuj personoj ne volas vidi la realaĵon, mi demandas: Ĉu estas normale, ke dum la kuranta lerno en la eksa Ĥaskovo-distrikto funkcias nur kvar kursoj, kaj tiuj por civitanoj — kun po 5—6 kursanoj. Ĉu tio estas ĝojiga laboro? Ĉu vere ni volas disvastigi Esperanton, aŭ ni agas laŭ maniero celanta limigi ĝin?

En la artikolo oni denove kaj denove minacas, ke diplomoj subskribitaj de kursgvidantoj kun III-a instrugrado estos nevalidaj. Tamen en la citita tabelo ili mem

montris kiom da gekursanoj ne diplomiĝas. Kial?

En la enkonduko de la artikolo la aŭtoro penas kompromiti homojn, kiuj scipovas pensi memstare kaj diference de la gvidantoj de KISA.

Interese estas ĉu homoj, kiuj tiel obstine subtenas la tezon pri instrurajtaj kursgvidantoj, scias kiom da neregulaj instruistoj laboras en la lernejoj de lando. Ciferoj pri tio aperis en la gazetaro en oktobro pasintjare.

Do ni denove revenu al la sistemo de Esperanto-instruado. Laŭ la ciferoj, kiujn oni publikigas ĉiujare, ekde 1972 ĝis nun en Bulgario devus esti minimume 50 000 esperantistoj. Bedaŭrinde, ni ĉiuj bone scias, ke ili estas apenaŭ 10 000. Nur de tiu fakto oni povas fari konkludon pri la efektiveco de nia instrusistemo.

Tiuj rezultoj estas tute naturaj, konsiderante la fakton, ke en nia lando oni organizas 20-tagajn kursojn kaj dum la ferioj — eĉ 8—10-tagajn kursojn. Kaj post la finiĝo de tiuj kursoj oni disdonas diplomojn. Jen la serioza kaŭzo, pro kiu la bulgaraj esperantistoj ne scias bone Esperanton. Videblas, ke tiu instrutempo tute ne sufiĉas por bona alproprigo de la lingvo.

Mi proponas, ke ankaŭ aliaj homoj — estraranoj de societoj kaj kursgvidantoj — kun aŭ sen instruarajto, dividu sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ sian opinion pri la starigitaj demandoj.

Penjo STOJANOV

## ATENTU, LEGEMULOJ!

**Survoje.** Dumonata E-revuo, organo de UNIKO (Unuiĝo de Novtipa Internacia Kulturo). Ĉefredaktoro: Aleksandr Fjodorov. Redaktejo: „Survoje“, SU — 432032, Uljanovsk — 32, P. k. 913, Sovetio.

Sovetiaj esperantistoj agrable surprizigas nin per provnumero de nova revuo „Survoje“, aperinta junio de 1988.

En la enkonduka artikolo oni interalie legas: „La periodaĵo strebas al-

menaŭ parte krei kondiĉojn por kresko, memedukiĝo de la necesa en Esperanto (kaj ne nur en ĝi) arta genieco, fari konscian paŝon al Novtipa Internacia Kulturo pli supera, ol la nun ekzistanta.

Ni ne pretendas iun ajn prioritaton en la afero, sed elpaŝas kiel unu el la similaj kultur-centroj spontane naskiĝintaj kaj naskiĝantaj en Esperanto.

La redakcio klare konscias, ke la

intencata celo estas atingebla nur per komunaj fortoj de E-komunumanoj loĝantaj diverslande en la mondo. Internacian kulturan progreson ne estas eble atingi nur per fortoj de esperantistaro (eĉ se plurnacia!), loĝanta en unu lando.”

Ni deziras sukceson al niaj sovetiaj samideanoj kaj kolegoj!

prof. H. Marinov,  
„Ami Boue“ 51, 1606 Sofia.



## INFORMOJ PRI EKSTERLANDA E-MOVADO

Ekzistas diversaj manieroj ekscii ion pri la eksterlanda Esperanto agado: per revuoj „Esperanto“ kaj „Heroldo de Esperanto“, per diversaj landaj revuoj k. a., tamen al mi ŝajnas pli alloga la novaĵo, ricevita de plumamikoj. Tiurilate la E-societoj „Penka Miĥajlova“ en komunumo Serdika kaj „Espero“ en komunumo Nadeĵda en Sofio estas feliĉaj, ĉar neniam mankas novaĵoj al ili. Jen fragmentoj el tri leteroj de iliaj amikaj eksterlandaj societoj en Skotlando, Francio kaj Aŭstralio.



Interesajn novaĵojn proponas la letero de s-ro Ron Calder el **Edinburgo** de 26.XI.1988:

Ni daŭre ricevas ekzemplerojn de „Bulgara Esperantisto“, pro kio ni tutkore dankas al via Klubo. La nova formato estas tre alloga.

La Edinburga Societo ankoraŭ vivas — kvankam ne tre vigle. Ni kunvenas ĉiusemajne, je merkreda vespero, kaj interdiskutas multajn realajn temojn. Sed ni ne sukcesis allogi pli da anoj. Antaŭ iom da tempo mi petis al la ĉefbibliotekisto de Edinburgo, ke li permesu al ni fari ekspozicion de Esperantaĵoj en la urba biblioteko dum la venonta jaro, hodiaŭ venis letero, en kiu li tute rifuzas la peton — eĉ ne unu vorto pri ebleco en la estonteco, nur simpla rifuzo. Iom malkuraĝiga.

La Universala Kongreso okazos en Britujo, kaj eble ni gajnos iom da propagando el tio, aparte el unu el la postkongresaj ekskursoj, kiu verŝajne venos al Edinburgo. Laŭ la unua bulteno, la ekskurso vizitos Edinburgon kaj Glasgovon, sed mi konstatas, ke la ekskursantoj loĝos kvin noktojn en Edinburgo. Eble mi havos la honoron konduki ilin vizite al la vidindaĵoj de Edinburgo.

Dum kvar monatoj de la somero, okazis granda festivalo en Glasgovo, nomita la Glasgova Ĝardenfesti-

valo, kvankam temis pri diversaj aferoj krom ĝardenoj. Ĝi estis subvenciita de la nacia Registraro, kaj vizitis ĝin kvar kaj duono milionoj da personoj. Kiel parto de la festivalo estis „Halo de la Paco“; super la enirejo troviĝas la devizo (en la angla lingvo) „La tuta mondo estas unu domo“. Ni esperantistoj elmontris specialan afiŝon, en kiu ni uzis la halan devizon, kaj aldonis: „Kaj ni sentas nin hejme en ĝi“. Mi kunsendas ekzempleron de tiu afiŝo. Krom tio estis plua afiŝo, kun informoj pri Esperanto.

Antaŭ kvin monatoj mortis la sekretario de la Edinburga Societo; fakte dum pli ol jaro li ne partoprenis niajn aktivadojn. Li havas 89 jarojn. Li heredigis al la Societo siajn librojn, pli ol 250. Ĉar la Societo mem ne havas propran kunvenejon, ili devas resti ĉe mi dumtempe. Ili nun kuŝas en sep kartonaj skatoloj.

En **Parizo** la bildo estas alia. La gvidantino de E-grupo G. Baudry en sia letero de 22.12.1988 skribas:

„Unue, ni dankas pro la abono al „Bulgara Esperantisto“. ... Lastatempe nia grupo ne bone funkciis, ĉar striko de „R. A. T. P.“ ĝenas ĉiujn iradojn en la Pariza regiono. Niaj anoj ne plu estas junaj, do ne regule venas. Ĉiuvendrede mi transiras de la suda al la norda parto de la urbo, mia „metro“ ne funkcias, la busoj malrapidas sur plenplenaj stratoj.“

Ĝojigajn novaĵojn anoncas la letero de mia persona leteramiko el **Meksiko** Fidel Figueroa. En sia letero de 15.11.1988 li skribas:

„Jes! Mi ja apenaŭ povas akcepti tion, kion mi vidis: du malgrandaj grupoj da komencantoj, kiuj jam ekparolas kaj komprenas E-on; Morgaŭ mi sendos iliajn kotizojn al UEA. Unu el la gvidantoj estas s-ro Martin Winant, hungardevena esperantisto, kiu ellernis la lingvon de Henry Narabaĉiu; s-ro Winant, kvankam maljuna kaj preskaŭ blinda, ankoraŭ estas fervora esperantisto kaj lerte instruas. La alian grupon gvidas la 17-jara junulo Joaquim Rosillo; li estas la sola denaska esperantisto en Meksikio; kaj nun li reprezentos nian meksikan Esperanto-Federacion en la internacia konferenco por evoluo de Esperanto.

... Kiel mi rakontis al vi, la ĉefurbo Meksiko estas tiom granda kaj nia movado tiom febla, ke venki tiom probleman urban movadon per niaj malgrandaj fortoj, estas la triumfo; tio, kio en la pasintaj ok jaroj ni neniam vidis...“

Ni estimas la strebojn de niaj amikoj labori arde por Esperanto kaj niaflanke ankaŭ sciigas ilin pri nia E-laboro.

Marija P. ANGELOVA

## AĈETU EN LA LIBROVENDEJO DE BEA!

### BELETRO ORIGINALA

---

**Beletraj eseoj.** Georgi Miĥalkov.  
(0.45 lv.)

**Gardu la pacon!** — poezio. Asen Grigorov. (2.40 lv.)

**Mistera lumo.** Georgi Miĥalkov.  
(2.70 lv.)

**Rozo kaj glavo.** Antologio. (2.05 lv.)  
**Vagante tra la mondo maltrankvila.**  
Nadija Andrianova. (3.90 lv.)

### BELETRO TRADUKA

---

**Apostolo de la libereco.** Mercia MacDermott. (4.26 lv.)

**Bulgara nuntempa poezio kaj prozo.**  
Antologio. (1.75 lv.)

**Elektitaj versaĵoj.** Ĥristo Botev.  
(0.59 lv.)

**Kantoj de motoroj.** Nikola Vapcarov.  
(1.90 lv.)

**La glacikovrita ponto.** Ljuben Stanev.  
(2.39 lv.)

**Rakontoj.** Jordan Jovkov. (1.85 lv.)

**Sub la jugo.** Ivan Vazov. (3.20 lv.)

**Ŝtelisto de persikoj.** Emilian Stanev.  
(1.00 lv.)

**Tango.** Georgi Karaslavov. (0.85 lv.)

**Timur kaj lia taĉmento.** Arkadij Gajdar.  
(1.00 lv.)

**Tra la ventego.** Ĥristo Smirnenski.  
(1.08 lv.)

**Vilaĝo Borovo.** Krum Velkov. (0.79 lv.)

### LERNOLIBROJ KAJ INSTRUHELPILOJ

---

**Lernolibro por unua grado.** Markov, Vâlev, Sarafov. (0.95 lv.)

**Lernolibro por dua grado.** Violin Oljanov. (1.40 lv.)

**Lernolibro por tria grado.** Violin Oljanov. (0.85 lv.)

**Ekzercaro por elementa kurso.** Neno

Janev. (0.65 lv.)

**Postkursaj legaĵoj.** Oljanov, Janev.  
(0.55 lv.)

**Didaktikaj lingvaj ludoj.** Aleksandr Fjodorov. (0.75 lv.)

**Programoj kaj regularoj por ekzamenoj.** (0.65 lv.)

### VORTAROJ

---

**Bulgara-Esperanta Vortaro.** Asen Grigorov. (0.70 lv.)

**Esperanto-bulgara Vortaro.** Asen Grigorov. (0.60 lv.)

### GRAMOFONDISKOJ

---

**Jubilea koncerto de Veselin Damjanov.** (2.30 lv.)

**Kantas Miŝo Zdravev.** (0,70 lv.)

**Ni vivos!** — originala dramo pri Lidia Zamenhof. Georgi Miĥalkov. (2.30 lv.)

**Poemoj.** Ĥristo Gorov. (2.30 lv.)

### ESPERANTAĴOJ

---

**Insignoj.** (0.30 lv.)

**Insignoj.** (0.40 lv.)

**Portreto de Zamenhof.** (0.32 lv.)

**Ŝlosilteniloj.** (6.20 lv.)

## BRILA KONCERTO EN VARNA

*„Amu kaj ellernadu la grandan arton — la muzikon. Ĝi malfermas al vi tutan mondon de grandaj sentoj, pasioj, pensoj. Ĝi faros vin spirite pli riĉaj, pli puraj, pli perfektaj. Dank' al la muziko vi trovos en vi mem novajn, nekonatajn al vi pli frue fortojn. Vi vidis la vivon en novaj tonoj kaj koloroj. La muziko ankoraŭ pli multe proksimigos vin al tiu idealo de perfekta homo, kiu estas la celo de nia komunista konstruado.“*

**Dmitrij Ŝostakoviĉ**

De la 19-a ĝis la 24-a de novembro 1988 gasto de Esperanto-societo „Albatroso“ en Varna estis la pianisto-virtuozo — la esperantisto Andrés Linero Branly, profesoro de piano en tri universitatoj en Bogota, ĉefurbo de Kolombio. En novembro 1988 li entreprenis grandan muzikan mondvojaĝon. La 28-an de oktobro 1988 li ekflugis per jeto el Bogotá kaj vizitis Francion, Belgion kaj Norvegion. En la lastaj du landoj li prezentis piano-recitalojn. Tie li plenumis famajn komponaĵojn de J. S. Bach, L. van Beethoven, F. Liszt kaj Chopin.

En sia letero, adresita al la subskribinto li skribas: „Mi tute ne postulas grandan koncertejon, nek altan honorarion; nur la ĝojo ludi por esperantistoj sufiĉas! Mi kun plezuro ludos kelkajn piano-komponaĵojn de famaj komponistoj kolombiaj. Kompreneble, vi povas inviti ankaŭ ne esperantistojn geurbanojn, kiuj havas intereson pri ĉi tiu arto.“

La 23-an de novembro 1988 en la granda salono de la Muzika Lernejo „Dobri Ĥristov“ en Varna, prof. Andrés Linero Branly ludis por esperantistoj kaj geurbanoj, ŝatantoj de piano-muziko. Kelkajn tagojn antaŭ la koncerto s-ro Branly provludis en la Klubo de la Agantoj de Kulturo, kiu disponigis al li sian bone agorditan pianon.

Per tondraj aplaŭdoj kaj frêŝaj aŭtunaj floroj la geesperantistoj esprimis sian dankon. Per kortuŝaj vortoj inĝ. Uzunova, prezidantino de Esperanto-societo „Albatroso“ dankis al profesoro Branly pro lia sorĉa, virtuozita muziko kaj bondeziris al li feliĉan vojon kaj multajn sukcesojn dum lia landa mondvojaĝo. La ĉeestanta Stojan Kostadinov el Sofio, prezidanto de la Sekcio de Veteranoj, ornamis la bruston de s-ro prof. Andrés Linero Branly per la Ora Medalo de BEA, okaze de la 100-jara datreveno de Esperanto. Kortuŝite, s-ro BRANLY dankis kaj promesis porti ĉi tiun medalon dum ĉiuj sekvaj koncertoj-recitaloj! Specialan dankon li esprimis al la esperantistino Maria Dimitrova, profesorino de hispana lingvo en la Kvara Lingva Gimnazio „Frederic Joliot-Curie“ en Varna, kiu per sia aŭtomobilo montris al li Albena, la Orajn Sablojn kaj aliajn vidindaĵojn de Varna.

La sekvantan tagon nia gasto forveturis al Istanbulo, kie la turkaj esperantistoj atendis lin...

Okaze de la Nova Jaro la varnaj esperantistoj ricevis novjarajn bondezirojn de s-ro Branly el Hongkong!

La esperantistoj el Varna longe memoros ĉi tiun unikan brilan koncerton!

**Doc. Georgi DIMOV**

## GASTE EN PISANICA

Ekde la novjaraj festoj ĝis la 13-a de januaro 1989 en IEK-Pisanica restadis 37 gelnantoj el urbo Leningrado, Sovetunio.

La grupo konsistis el infanoj de laboristoj ĉe la Leningrada Optik-Meĥanika Unuiĝo „LOMO“. Ĉiuj ili venis en Pisanica el diversaj lernejoj de belega Leningrado. Sed sur nia gastama bulgara grundo ili formis veran kolektivon. Esperanto unuigis la sovetiajn gejunulojn. Ĉiutage ili lernis nian ŝatatan lingvon kaj ekamis ĝin.

Grandega estis la ĝoja surprizo de la loĝantoj de la Rodopa vilaĝeto Pisanica kiam ili vidis la neĝan ĉevalon faritan de la leningradaj lernantoj. Tiamaniere ili montris la tradician rusan vintran arton prepari neĝajn figurojn por amuziĝo.

La reprezentantoj de la soveta kaj bulgara junularo amuziĝis bonege dum la Interkona Vespero. Estis elektitaj la plej belaj junulo kaj junulino: li estis el Sovetio, ŝi el Bulgario.

La 13-an de januaro estis la lasta tago de la grupo en Bulgario. La kajo de la Centra Stacidomo en Sofio estiĝis loko de varmaj kisoj kaj brakumoj, sed oni ne aŭdis la vorton „Adiaŭ“. Nur „Ĝis revido!“

**Detelina NIKOLOVA**

## RENKONTIĜO DE INVALIDOJ

Antaŭ unu monato mi havis la feliĉon partopreni ĉeĥoslovakian Renkontiĝon de Handikapitoj (invalidoj) el socialismaj landoj. Mi pasigis tie unu semajnon kaj mi povas diri, ke ni vere meritas lokon en la esperanta medio. Ni ĉiuj parolis tre bone la lingvon. Dum la Renkontiĝo ni partoprenis diversajn kursojn: per komputilo, per domeno, por komencantoj, por progresintoj.

La vesperoj estis bone organizitaj — parolis samideanoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario, Francio, Sovetio. Venis mia vico saluti la ĉeestantojn en la nomo de la esperantistoj el urbo Jambol, kion mi volonte faris.

Bedaŭrinde, mi estis sola reprezentanto el nia lando. Mi promesis, ke post mia reveno mi faros ĉion eblan por plivigliĝo de la interrilatoj inter esperantistoj-invalidoj en nia lando.

Dum nia restado en Hodonin ni renkontiĝis kun neesperantistoj-invalidoj el Ĉeĥoslovaka Sekcio Praha kaj ili, aŭskultante nin, ege miris pri la sincereco kaj amikeco, kun kiuj ni handikapitoj rilatas unu al la alia. Vidinte la praktikan utilon de nia lingvo, ili deklaris, ke ankaŭ ili lernos ĝin.

La nutrado kaj dormado estis bone organizitaj, ne multekostaj. La loko estis pitoreska.

Mia tasko nun estas: Se invalido deziras viglan kontakton kun invalidoj-esperantistoj el la tuta mondo, turnu vin al mi. Mia adreso estas: Jambol 8600, Nigra rivero 13, Stefka Panajotova.

Interalie mi volas subteni la rezolucion de UEA, kiu montras ties intencon dum la estontaj kongresoj garantii al handikapitoj taŭgan prizorgon. Brave al UEA!

Fine, mi dankas al la Ĉeĥaj organizintoj de la Renkontiĝo, kaj diras al ĉiuj ĝis reaŭdo dum la venonta renkontiĝo 1989, apud Praha.

## En gabrova elementa lernejo

# LECIONOJ DE ESPERANTO

Ekde la lernojaro 1978/79 en 11-a elementa lernejo „T. Karpinskaja” — Gabrovo, funkcias E-rondo, kies gvidantino estas mi, Sonja Tiĥova. Dum tiuj 10 jaroj preskaŭ 100 gelernantoj lernis Esperanton. Miaj gelernantoj diligente lernas la lingvon, havas multajn korespondantojn. Ofte estas aranĝitaj ekspozicioj de E-leteroj, ricevataj de la gelernantoj, bildkartoj kun diversnaciaj popolkostumoj, kun vidindaĵoj el diversaj landoj, pupoj k. a.

En aprilo 1981 ili partoprenis la 14-an Nacian Revuon de E-Parolo kaj Kanto en Pazarĝik kaj gajnis trian premion en la ĝenro — „kanto”. Unu lernantino ricevis kuraĝigan premion en la ĝenro „recitado”.

En majo 1982 tri niaj lernantinoj partoprenis la Internacian E-konkurson de Boteva kaj Revolucia Poezio en

Vraca kaj gajnis premiojn.

En oktobro 1982 lernantinoj partoprenis la programon de la Nacia E-Renkontiĝo en Drjanovo-monaĥejo.

La 21-an de januaro 1983 la gelernantoj prezentis E-programon per Radio Gabrovo. Ili malfermis la Nacian E-renkontiĝon „Humuro kaj Satiro” ’83 per „Kanto pri gabrovanoj” en E-o k. a.

En 1985 15 membroj de nia rondo partoprenis la internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj en urbo Moia (Hispanio) kaj ricevis donacojn. En la sama jaro ni kolektis 542 subskribojn de gelernantoj el nia lernejo sub la „Apelo de Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso de la nukleaj armiloj”. Ni aliĝis al la apelo de gejunuloj-esperantistoj el Kartvela SSR kaj sendis leterojn kun subskriboj de la gelernantoj el la 8-aj klasoj de

nia lernejo al la eksa Prezidento de Usono Rejĝan, kun peto, ke li aliĝu al la proklama de M. Gorbaĉov moratorio por la nukleaj armiloj.

Ĉi-jare mi havas novajn kursanojn — 10 gelernantoj el la 4-aj klasoj. Ili jam vizitis la domon de la E-veteranino Elena Kovaĉeva kaj trarigardis la riĉan kolekton de pupoj el la tuta mondo kaj aŭskultis la surbendigitan ridon de la birdo Kokabara el Aŭstralio, kiu imitas homan ridon.

Ni ankaŭ ĉeestis la nacian konferencon de la Bulgara MEM-sekcio, la 29-an de oktobro 1988 en Drjanovo.

Ni sendis leterojn al Litova SSR, en Kaŭnas kaj en Vilno por subteni la ideon de la litovaj esperantistoj pri rekonstruo de la domo sur strato „Zamenhof” 5 en Kaŭnas, kiu estos uzata kiel regiona E-centro.

Sonja TIĤOVA

## Tra la gazetaro

### EN SOFIO:

Jurnalo „Oteĉestven Front” (11.XII.1988) donas lokon al artikolo de Atanas Ilkov pri la Monda Informa Centro „Zamenhof” en Bjalystoko, Pollando; studenta semajna gazeto „Studentska Tribuna” (15.XI.1988) publikigis informon de Rumjana Vasileva pri la 44-a Kongreso de TEJO en Zagrebo; semajna gazeto „Trezvenost” (6.XII.1988) informas pri naciskala konferenco pri profilaktiko en Bankja, menciante, ke unu el la organizantoj estas Medicina Sekcio de BEA; monata gazeto „Muzikalni Horizonti” (kajero 10, oktobro 1988) aperigis informon pri distingo per unua premio de poeziaj eroj de An. Atanasova kaj muziko de P. Djatĉina en la Belarta Konkurso de UEA; monata gazeto „Filatelen Pregled” (kajero 11, novembro, 1988) presigas informon de Nikolaj Evtimov pri ekspozicio de filatelistoj-esperantistoj en u. Veliko Târnovo.

### EN LA LANDO:

Jurnalo „Ŝumenska Zarja” u. Ŝumen (6.X.1988) per la plumo de Hristo Totev informas pri solenaĵo en u. Ŝumen, okaze de la 80-jara datreveno de la Dua

Kongreso de BEA, okazinta en 1908 j. en tiu urbo: la sama ĵurnalo (16.XII.1988) publikigas grandan artikolon de Maria Kumanova, kunlaborantino de la Ŝtata Arkivo, pri revolucia movado en la iama knabina gimnazio en Ŝumen, menciante la agadon de la Esperanto-grupo en tiu gimnazio; la sama (17.XII.1988) publikigas foton de librovendejo „Naĥodka” en la urbo, disvastiganta Esperantan literaturon; en Ĵ. „Ŝipka” — u. Haskovo (3.XII.1988) sub titolo „Lingvo Esperanto kaj dudekunua jarcento” aperigas ampleksan artikolon de Penju Stojanov pri lia enketo inter elstaraj kaj ordinaraj esperantistoj kiel ili prezentas al si la vivon en XXI jarcento. „Septemvrijsko Delo” — u. Miĥajlovgrad, Raja Androvska informas pri la internacia kino-foto-festivalo okazinta en u. Vraca; Ĵ. „Oteĉestven Zov” — u. Vraca, (7.XII.1988) informas pri renkontiĝo de la redakcio de gazeto „Bulgara Esperantisto” kun esperantistoj el Vraca, Bjala Slatina kaj Orjaĥovo; Ĵ. „Lozenska Iskra” — u. Loznica (11.XI.1988) informas pri regiona revuo de Esperanta parolo kaj kanto de la esperantistoj el la departementoj de Razgrad kaj Varna.



## JUNULARA SEMAJNO EN HUNGARIO

Kiel sciante, Internacia Junulara Semajno (IJS) okazas ĉiujare unu semajnon antaŭ la Internacia Junulara Kongreso. En 1989 IJS okazos en urbo Szolnok, Hungario, inter la 8-a kaj 14-a de julio. Organizantoj: Lingvo-Studio, Budapeŝt kaj Hungara Esperanto-Junularo.

Se vi jam partoprenis ĝin en la antaŭaj jaroj, vi scias kio ĝi estas. Se ne, vi sciis, ke karaktero de IJS estas ripoza somerumado en esperantista junulara medio. La vorton junulara ni interpretas, ke juna estas tiu, kiu sentas sin tia!

Dum la semajno ni havos gajan, multnecian, ferian etoson kun multaj movadaj kaj nemovadaj programejoj (Tradicia balo, folkloro, kinofilmo „Mephisto” kun profesia E-sinkrono, Dinnyes-Koncerto, multaj ludoj kaj konkursoj, politika forumo pri Hungario... ktp.), kaj ni havos tempon ankaŭ por somerumado, por viziti naĝejon kaj la urbon. La tuto funkcios kiel malgranda, unusemajna Esperantio. Tial ke IJS okazas en la semajno tuj antaŭ IJK, ĉe la fino ni organizos komunan karavanan vojaĝon al IJK en Kerkrade.

Dum la semajno ni loĝos en ripozejo ĉu en someraj, turistaj dometoj (8-litaj ĉambroj), ĉu en ŝtonaj domoj (2 kaj 4 litoj), ĉu en la propraj tendoj. La partoprenkotizo inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj la programojn.

Partoprenkotizoj en jenaj I. 2—4-litaj ĉambroj — 3600 ft (210 ned. gld.), II. someraj turistaj dometoj — 3000 ft (185 ned. gld.), III. propraj tendoj — 2400 ft (140 ned. gld.).

La kategorioj validas laŭ la dato de la pago!

Pluaj informoj haveblas ĉe Lingvo-studio (Tel: +36-1-288258) aŭ ĉe HEJ. La aliĝilojn petu kaj sendu al: Lingvo-Studio, Szilvási László, H-1675 Budapeŝt, P. K. 87, Hungario.

## TERMINOLOGIA SEMINARIO

En POPRAD (Altaj Tatroj), de la 12-a ĝis la 21-a de junio 1989 TERMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO (TEC) aranĝos seminarion por organizantoj de terminologia laboro. Inter la 12-a (alveno) kaj 21-a (forveturo) okazos 7 labortagoj + 1 tuttaga ekskurso.

Skizo de programenhavo:

1. **Teoria fundamento:** nuna stato de terminologio kiel lingvoscienco kaj lingvoplanada praktiko; teoriaj orientiĝoj; praktikaj labormetodoj; ĝisnunaj atingoj; limoj kaj novaj evolutendencoj.

2. **Praktikaj ekzercoj:** nocia analizado; ellaborado de nociaroj; homonima kaj sinonima analizado; normigado; terminologia eluzado de fakaj tekstoj; kreado de terminologiaj kaj dokumentaj sliparoj (nurpaperaj kaj komputilaj).

3. **Terminografia projekto:** determino de terminologia esplorkampo; determino de terminologiaj fontoj; starigo de miksita laborkomitato (fakuloj kaj

terminologoj); terminologia pritraktado de fontaj dokumentoj; ellaborado de terminologiaj dosieroj; redaktado de terminara projekto.

Ĉeflektoros d-ro E. Brent, Kanado, terminologo kaj lingvokonsilisto ĉe Office de la langue française; Infoterm (Vieno) kaj DLT (BSO. Utrecht) estas reprezentotaj.

Rajtas aliĝi ĉiu terminologie serioze interesita esperantisto, sed preferon havos TEC-anoj, speciale reprezentantoj de fakaj kaj landaj E-organizaĵoj kaj aliaj gvidantoj. 30 lokoj disponeblas, laŭeble frua aliĝo helpas tajlori la programon. La kostoj: 990,- — CSK (Kĉs) por loĝigo kaj manĝoj.

Interesitoj skribu al: Wera Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, Pf., 113—05, Berlin, DDR—1141

## VIZITU JES

La Distrikta Estraro, Leipzig, de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, vin invitas partopreni en nova internacia esperantista aranĝo, kiu nomiĝas Jarmezaj Esperantista Semajnfino (JES) kaj okazos de la 23-a ĝis la 25-a de junio 1989 en la urbeto Markkleeberg, kiu estas kvazaŭ urboparto de Leipzig. Ĉiujn preparojn de tiu ĉi aranĝo faras la sama teamo, kiu de multaj jaroj sukcese okazigas la famekonatan aranĝon IFER (Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo). Jes, la organiza komitato invitas ĉiujn esperantistojn de la mondo al partopreno en tiu aranĝo, kiun ni unuafoje okazigos en kunlaboro kun la Agrikultura Ekspozicio de GDR (ĉetero la plej granda tiaspeca!); Ni elektis kiel ĉefan temon de la aranĝo: „Panon por ĉiuj havas la tero”.

Ni gastigos ĉirkaŭ 250 esperantistojn el multaj landoj de la mondo; jam nun ni petas proponojn de fakuloj pri prelegoj ktp., kiuj rilatu al la menciita ĉeftemo.

JES-aranĝo ne nur turnas sin al ekspertoj pri agrikulturo, sed al ĉiuj esperantistoj, kiuj intencas uzi la Internacian Lingvon kiel interkomprenilon. Tamen: interesiĝantoj pri naturprotektado, forstado, naturo en tre vasta senco, bestobredado, etĝardenado kaj similaj temoj havos la okazon pliprofundigi tiurilatajn konojn.

JES okazos sur la areo de la Agrikultura Ekspozicio de GDR en Leipzig — Markkleeberg, do meze de verda naturo! La programaro de tiu Ekspozicio estas ege abunda kaj alloga — vere por ĉies gusto!

## E-ARANĜO POR INVALIDOJ

La 1-a Internacia Renkontiĝo de E-invalidoj okazos inter la 19-a kaj 27-a de aŭgusto 1989 en urbo Ĉeska Trebová, Ĉeĥoslovakio.

Ĝenerala temo de la Renkontiĝo: „Kion signifas Esperanto por invalidoj”.

La Renkontiĝon aranĝas la Sekcio de E-invalidoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Informpetojn adresu al: Sekcio de E-invalidoj, PK 63, Slaný 274 01 — Ĉeĥoslovakio.

## KIAM MI ESTIS ĈEFREDAKTORO...

Dum sia sepdekjara ekzistado revuo „Bulgara Esperantisto“ ĉiam estis tribuno de bulgaraj kaj fremdlandaj esperantistoj pri la problemoj de la Esperanto-movado, modelo de klasika Zamenhofa lingvaĵo.



## Preskaŭ ok jarojn



Ekde la 1-a de januaro 1981 mi transprenis la postenon de ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ de Kunĉo Vâlev, kiu estis elektita ĝenerala sekretario de BEA.

Kvankam mi havis pli ol dudekjaran profesionan ĵurnalisman sperton kaj la sperton de multjara esperantisto-aktivulo, mi komencis mian laboron iom hezite — ja tio estis esperantlingva revuo! Baldaŭ mi spertis kolegecan kaj kamaradecan helpon — unuavice tiun de K. Vâlev kaj de mia kunredaktoro Evgeni Georgiev — juna homo, bonege reganta Esperanton kaj spertulo pri poligrafiaj aferoj. Ni kune komencis la preparon de la unua kajero de „Bulgara Esperantisto“ por 1981. La laborkondiĉoj estis malbonaj. La „redakcio“ okupis nur anguleton en la

oficejo de la Internacia Esperanto-kursejo sur bulvarado „Ĥristo Botev“ 99, kie ni triope sidis ĉe unu skribotablo kaj diskutis pri la materialoj kaj ilia grafika aranĝo sur ĉiu aparta paĝo de la estonta numero. Ĉiu el ni plenumis po kelkajn taskojn: redaktado, korektado, tajpado, ktp. La presejo estis ege malnova, kun eluzitaj maŝinoj kaj rilatis bonkore al ni. Dank' al ilia simpatio al Esperanto ni havis eblecon ŝanĝi, forpreni aŭ aldoni materialojn eĉ en la plej lasta momento, kiam la revuo jam estis preta por presado.

Libervolaj membroj de la redakta komitato estis fervoraj esperantistoj kiel Krâstju Karucin, Dimitâr Haĝiev, Vasil Borovanski, Dimitâr Denĉev, Flori Nikolov, kiuj bone regis la lingvon kaj estis spertaj publicistoj. Ili ĉiuj aktive verkadis diversajn materialojn kaj per siaj konsiloj multe helpadis al mi. Vicĉefredaktoro estis Ĥaim Levi, profesia ĵurnalista kaj mia amiko de la fruaj jaroj de nia kariero.

Por la bona lingva nivelo de la revuo multe kontribuis Lidia Raeva, iama tradukistino en revuo „Nuntempa Bulgario“, kiun mi invitis kiel salajratan kunlaboranton de la redakcio. Post nelonge al nia redakta skipo aliĝis la juna ambicia ĵurnalistino Maria Jankova, fininta, la ĵurnalisman fakultaton de la Sofia Universitato.

Dekomence ni faris neniam seriozajn ŝanĝojn en la grafika aranĝo de la revuo, kvankam ni havis kelkajn interesajn konceptojn kaj ideojn. Por mi, kiel ĉefredaktoro, estis pli grave krei normalajn laborkondiĉojn — bazon por plua ĉiujflanka plibonigo de la revuo. Sed la sorto ne estis tre agraba al ni — la redakcio ŝanĝis sian adreson sesfoje, do, preskaŭ ĉiun jaron. Malgraŭ tiu migrado, malgraŭ la ŝanĝo de la presejo, spite al multaj aliaj organizaj obstakloj, la redakta skipo ĉiam pli sukcese, ambicie kaj impete plibonigadis kaj la grafikan aranĝon, kaj la enhavon de la revuo, atinginte la impresigan jaran eldonkvanton de 6500 ekzempleroj. Por la ĝustatempa aperado de ĉiu kajero fine de la kuranta monato multe kontribuis ne nur la sindona laboro de la redaktoroj, sed ankaŭ la materialoj, kiun mi ŝuldis al la aktiva sinofera, libervola kunlaborado de niaj



korespondantoj el ĉiuj partoj de la lando kaj ankaŭ el eksterlando. Dank' al tiu kunlaborado ni povis plenumi la ĉefajn taskojn de la revuo.

Tre interesa kaj rezultodona iniciato de la redakcio estis la organizita en Plovdiv teori-praktika seminario por E-korespondantoj, kiun partoprenis pli ol 100 aktivuloj el diversaj loĝlokoj de la lando. La lekcionoj de N. Aleksiev, Kr. Karucin, D. Papazov, H. Levi kaj D. Hitrov kontribuis al la altigo de la ĵurnalisma sperto de niaj libervolaj korespondantoj. Ĉiu el ili ricevis specialan „Karton de korespondanto“ de la revuo.

La unua jaro de mia redaktoreco — 1981, estis plena je gravaj eventoj: celebrado de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, XXVI kongreso de KPSU, XII kongreso de BKP, k. a., kiuj formis la ĝeneralan karakteron de ĉiu aparta kajero. Krom la oficialaj materialoj, ni donis lokon ankaŭ al multaj legindaĵoj, intime ligitaj kaj kun tiuj eventoj, kaj kun la tutlanda E-agado.

Per saĝaj konsiloj, per propraj verkoj konstante helpadis nian laboron Hristo Gorov (tiam prezidanto de BEA), Nikola Aleksiev, Kunĉo Vâlev, Canko Murgin, prof. Stojan Ĝuĝev, prof. Vasil Ĉoĉov, Violin Oljanov, Ljubomir Miĥajlov, Krâstju Karucin kaj multaj aliaj spertaj esperantistoj — publicistoj kaj lingvistoj.

La pozitiva bilanco de nia unua eldonjaro estis: plimultigo de la legantaro, multaj novaj libervolaj kunlaborantoj kaj perantoj de la revuo en 21 landoj de ĉiuj kontinentoj. Pri tio grandan meriton havis ankaŭ nia sindona administranto Metodi Garev — arda esperantisto-internaciisto.

Komence de 1982 eldonjaro, post konsultiĝo kun la Buroo de la Centra Estraro de BEA, la redakcio faris kelkajn gravajn ŝanĝojn en la grafika aranĝo kaj en la redakta komitato de la revuo. Novaj redakcianoj estis prof. Vasil Ĉoĉov kaj Marin Bâcev, ĉefmetodikisto ĉe BEA pri instrulaboro. La n-ro 1/1982 aperis kun nova moderna kovrilo; la titoloj de la konstantaj rubrikoj estis speciale pentritaj en moderna stilo. La strukturo de la materialoj estis ŝanĝita laŭ la konceptoj pri „arkitekturo“ de la nuntempaj eldonoj. Sur apartaj paĝoj aperis ankaŭ vinjetoj kiel finaĵoj de iuj materialoj.

Naciaj festoj; soci-politikaj kaj kulturaj tutpopolaj eventoj; datrevenoj; la tradiciaj revuoj-konkursoj de esperantaj kantoj kaj parolo, de Boteva kaj revolucia poezio; tagoj de E-kulturo, originalaj E-poeziaĵoj kaj prozaĵoj; recenzoj pri noveldonitaj libroj en Esperanto, la agado de esperantistoj-pacaktivuloj, raportaĵoj pri universalaj E-kongresoj kaj aranĝoj, vojaĝimpresoj k. a. trovis lokon sur la paĝoj de la revuo, riĉe ilustritaj per fotoj kaj grafikaĵoj de eminentaj pentristoj. Multaj el la publikigitaj materialoj apartenis al fremdlandaj kunlaborantoj (Akad. Bernard Golden, Doc. Detlev Blanke, Nadija Andrianova, k. a.) Specialajn kajerojn la redakcio dediĉis al la celebrado de la 75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio kaj al ĝia 41-a kongreso. La 100-jariĝo de Esperanto kaj ties celebrado dum la 72-a Universala Kongreso en Varsovio en 1987 estis unu el la plej gravaj temoj de la revuo traktata per diversaj materialoj fare de eminentaj historiistoj de Esperanto (Canko Murgin, Oskar

Stolberg kaj Fritz Wollenberg el GDR, doc. Josif Portnoj el Sovetunio, Adolf Holzhaus — Usono, k. a.)

Abunda stoko el diversaj materialoj kuŝis en la „deponejo“ de la redakcio, atendente sian vicon por aperigo. La ŝanĝo de la preseja bazo evidentiĝis „ponardo kun du klingoj“. Unuflanke pliboniĝis la poligrafia kvalito de la revuo; aliflanke la postuloj de la presejo deponi la materialojn por ĉiu sekvanta kajero du monatojn antaŭ ĝia apero malaktualigis multajn valorajn materialojn, kio tute prave provokis la malkontenton de niaj fervoraj korespondantoj.

Do, multaj materialoj ofte longe restis nepublikigitaj, en la ŝrankoj de la redakcio. Estis okazoj, kiam aŭtoroj plendis pro „aktiva interveno“ de la redakcio en iliaj kontribuadoj. Sed tio okazas ofte ankaŭ en aliaj redakcioj! Plej grava por ni estis la persisto de niaj kunlaborantoj, kies verkojn ni modeste honoraris, ĉar por ili estis vera honoro vidi siajn materialojn publikigitaj.

En la redakcio ni emis interparoli (eĉ disputi!) en Esperanto. Estis jam praktiko dum kunsidoj de la redakta komitato (ĉiun duan ĵaŭdon de la kuranta monato) interparoli en Esperanto. En la redakcian stabon venis novaj fortoj: prof. d-ro Kiril Popov, la verkistoj-poetoj Venelin Mitev kaj Georgi Miĥalkov, la aktivulino de BEJ Mariana Elenova. La artan-grafikan aranĝon jam faris la profesia teknika redaktoro Ljubomir Lazarov. Kontraŭ pago pri la korektado zorgis Jordan Ĉaljevski. Post malongdaŭra administrado fare de Metodi Garev, tiun gravan taskon surpris la fervora esperantisto Asen Josifov. Al li ne estis fremda ankaŭ la poezia kaj traduka verkado. Multfoje ni aperigis liajn verkojn.

Malgraŭ la pozitivaj, laŭdaj pritaksoj de bulgaraj kaj eksterlandaj legantoj pri „Bulgara Esperantisto“, ni ne estis kontentaj pro la malbonkvalita papero, kiu fuŝis la presadon de la kliŝoj. Tio ankaŭ estis la plej ofta riproĉo de la legantoj en iliaj leteroj kaj dum renkontoj kun ni.

Ili rigore atentigis nin pro la malklaraj bildoj en la revuo kaj postulis ilian plibonigon. Kion fari? Ni estis senpovaj kontraŭ la poligrafiaj normoj!...

La proceso de renovigo kaj rekonstruado en nia lando tuŝis ankaŭ la asocion de bulgaraj esperantistoj. La postuloj de nia nuntempo devigis la Estraron de BEA, ĉe-kape de la prezidanto Sava Dâlbokov, krei novajn organizajn strukturojn, junigi la gvidorganojn de la asocio. Tiu proceso rilatis ankaŭ la redakcion de „Bulgara Esperantisto“. Ĉar mi jam atingis la aĝon de pensiiĝo, laŭ decido de la Centra Estraro ekde la 1-a de marto 1988 mi cedis la postenon de ĉefredaktoro al mia juna kolegino Maria Jankova. Dum la jaroj de komuna redaktado de la revuo ŝi estis akirinta sufiĉe grandan ĵurnalisman sperton por kuraĝe daŭrigi nian noblan faron.

Okaze de la 70-jara jubileo de nia kara revuo „Bulgara Esperantisto“ mi bondeziras al ĝiaj legantoj kaj kunlaborantoj, al miaj pli junaj kolegoj en la redakcio kaj al iliaj kunlaborantoj ardan ĵurnalisman impeton por plua plibonigo de la revuo.

**Donĉo HITROV**

## Verdsemajno kaj varbsemajno

*Pri la verda semajno oni parolis kaj skribis multon kaj la rezultoj de ĝi estas konataj al ĉiuj. Varbsemajno estas io nova kaj la esperantistoj unuafoje aŭdas pri ĝi. Eble iuj komprenos, ke verda semajno kaj varbsemajno estas unu kaj sama afero kaj ili eble diros, ke la lasta estas tute nebezona. Por ne pensi tiel mi donas kelkajn klarigojn.*

*Verdan semajnon oni aranĝas farante grandan bruon, surgluante afiŝojn, disdonante flugfoliojn, aranĝante paroladojn, ekspoziciojn, malfermante kursojn k. t. p. (por ĝi necesas elspezoj) dum varbsemajno estas senbrua ago inter la esperantistoj. Verda semajno estas nur por la neesperantista publiko, dum la varbsemajno estas nur por la esperantistoj. Ĝi celas organizigi ĉiujn esperantistojn membrigante la malnovajn, neorganizitajn esperantistojn kaj varbante novajn membrojn — memlernantaj aŭ kursanoj.*

*Kiam kaj kiamaniere oni devas aranĝi ĉi ambaŭ semajnojn estas la ĉefa demando de la jena artikolo. Ĉu estas necese, ke verda semajno estu aranĝita samtempe en la tuta lando, aŭ diverse en diversaj urboj laŭ la cirkonstancoj? Kompreneble la lastan. La plej bona tempo por verda semajno kompreneble estas la aŭtuno, ĉar post ĝi oni povas malfermi tuj kursojn. Se post la verda semajno ne sekvos kursoj, ĝi estas superflua. Ju pli bone aranĝita verda semajno — des pli da kursanoj.*

*Ĉi tie ne estas loko paroli pri la instrumaniero, tial mi parolos pri la fino de l'kursoj.*

*Iuj societoj jam akceptis la praktikon aranĝi fermon de l'kursoj per letervespero por entuziasmigi la novajn esperantistojn. Dum tiu letervespero la novaj esperantistoj ricevas leterojn (ricevataj laŭ la donita anonco en iu esperanta gazeto) kaj*

(Daŭrigo sur paĝo 21)



**Originala  
verkaro**

Marija P. ANGELOVA

### PREĜO

*Mi preĝas al ĉiuj dioj,  
konataj kaj nekonataj,  
en la nomo de ĉiu vivanta estaĵo  
sur nia Tero.  
Mi preĝas por la vivo  
en la nomo de la plej granda  
montara besto,  
en la nomo de la birdoj  
en la plej malgranda nesto,  
ankaŭ en la nomo de tiu floreto,  
kiu radikas en plenmano de grundo  
sur vertikala roko;  
en la nomo de la bebo,  
kurbiganta la lipojn  
por la unua sia rideto;  
plantitaj kaj plantotaj,  
naskitaj kaj naskotaj,  
kiuj posedas nur unu  
vivon sur la Tero.  
Mi preĝas, ke ĉiuj,  
de kiuj ni dependas,  
demetu la erarigajn okulvitrojn  
kaj ekrigardu sobre sur la mond';  
ke venku la racio  
kaj oni forigu ĉion —  
civilan kaj militan —  
kio minacas la vivon.  
Mi preĝas al ĉiuj dioj  
por la vivo.*

Marija P. ANGELOVA

### ALVOKO

*Ne tuŝu per mano  
floreton teneran!  
Ĝin lasu trankvila  
ekbrili sub suno!  
Ke flavaj stamenoj  
disĵetu polenon  
kaj havu ni grajnon,  
belegan idaron!*

*Zorgeme eduku  
ni niajn knabinojn,  
ke ili elkresku  
kaj sanaj, kaj saĝaj,  
kun pensoj al idoj  
kaj dom' dediĉitaj,  
ke ili estiĝu  
homece feliĉaj.*



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

## AL VERKEMULOJ

Ĉiam estas interese legi poemojn de tute novaj aŭtoroj, kiuj ankoraŭ ne estas rutinitaj de la literatura metio kaj kies intencoj kortuŝas nin per sia natureco kaj pureco. Pri tio mi pensis, legante la versaĵon „Frua vintro“ de **Cveta Popova el Pernik**. Tamen en ĝi estas kelkaj nekorekteblaj gramatikaj eraroj. Nekorekteblaj, ĉar se oni korektus, ekzemple, la frazojn „ĉiu sezono enhavas la bel“, kaj „venkitaj estas la nigraj Ĥimer“, la rimoj tuj „rompiĝos“ kaj ne plu ekzistos la strofoj. Do, Cveta, lernu plu la lingvon, perfektigu kaj poste nepre sendu al ni novajn verkojn.

Lastatempe ni ricevis multajn tradukojn de poeziaj verkoj de bulgaraj kaj rusaj aŭtoroj. Ni tamen ne trovis inter ili taŭgajn por esti prezentitaj sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“. En la tradukoj de **Petâr Tanĉev el Stara Zagora** estas apartaj sukcesaj lokoj, sed liaj interpretoj de poemoj de K. Simonov, N. Tiĥonov kaj J. Utkin ĝenerale estas pala respegulo de la originaloj. Do li evitu la ŝablonajn rimojn, ĉiam strikte respektu la ritmon, serĉu freŝajn sinonimojn!

La samon ni rekomendas al **Marijka Taneva el Karnobat**. Kaj speciale al ŝi ni direktas ankaŭ unu rekomendon: por tradukado en fremdajn lingvojn oni devas elekti nur bonajn verkojn de la klasika kaj nuntempa bulgara literaturo! Oni ne devas eluzi senutile la paperon kaj sian tempon por efemeraĵoj.


Nia samideanino **Anna Gruchala el urbo Slupsk (Pollando)** sendis al ni tri poemojn. Du el ili — „Ni ĝojas“ kaj „Preĝo de montoj“ — parolas pri ĉeesto de talanto, tamen ŝi devus ankoraŭ iomete plibonigi ilin el lingva vidpunkto kaj „liberigi“ ilin el iuj superflujaj vortoj kaj bildoj. La tria versaĵo — „Nia ideo“: delonge konataj pensoj, ritmo kaj rimoj.

Ne brilas per originaleco ankaŭ la versaĵo „Gardu la pacon“ de **Desislava Gospodinova el Karnobat**. Ni esperu, ke tio ĉi estas rezulto de ŝia juneco (ŝi estas lernantino) kaj de manko de sperto (ĉi tio estas ŝia unua versaĵo).

Venelin MITEV



## BULGAROJ DE MALNOVA TEMPO



### (FRAGMENTOJ)

Haĝi<sup>1</sup> Genĉo eniris sian domon kaj Avino Haĝulino<sup>2</sup> bonvenigis lin, timeme rigardante al sia sultano; sed vidinte, ke ŝia despoto estas bonhumora, ŝi kuraĝis demandi lin:

— Kie vi estis hodiaŭ, Haĝi?

— Mi estis gaste, Haĝulino, kaj mi portas al vi bonajn novaĵojn. Preparu vin aŭskulti ilin.

— Diru, Haĝi, mi aŭskultas.

— Vi volas scii, ĉu ne?

— Nu diru do, diru, mi petas vin!... Eble vi ricevis leteron de mia filo, de Kostadinĉjo? Kiel li fartas? Ĉu bone fartas mia fileto, mia kolombeto? Ĉu li sanas?

Kaj Avino Haĝulino penis legi en la okuloj de la edzo almenaŭ parteton de la respondoj al siaj demandoj.

— Ne, Haĝulino, ne temas pri tio.

La plena de patrina amo kaj tenereco rideto sur la vizaĝo de Avino Haĝulino estingiĝis kaj ŝi diris jam ne tiel vigle kaj scivole kiel antaŭe:

— Nu, faru laŭ via plaĉo, Haĝi. Se vi volas — diru al mi, se vi ne volas — ne necese.

— Se tiel, mi volas iom turmenti vin... Nun mi ne diros al vi ion ajn, morgaŭ vi ekscios.

<sup>1</sup>) Haĝi — haĝulo

<sup>2</sup>) Avino Haĝulino — ĉi tie la vorto *avino* estas uzata en senco de maljunulino, oldulino; haĝulino edzino — de haĝulo.

— Vi, Haĝi, estas malbona homo. Mi sciis tion jam kiam mi edziniĝis kun vi... Vi neniam similis al la aliaj homoj — ĉagrenite diris Avino Haĝulino.

— Ĉu vi vespermanĝis? — demandis Haĝi Genĉo sian maljunulineton.

— Ne ankoraŭ.

— Kaj mi, haĝulino, jam manĝis.

— Ĉu vi tion volis diri al mi, Haĝi?

— Ne, ne tion, edzino mia!... Atendu iom, ke venu ankaŭ mia filineto, tiam mi diros al vi ĉion, kion mi scias... Mi sciigos al vi tre gravan kaj agrablan novaĵon...

Sed Haĝi Genĉo ne ĝisatendis la alvenon de sia filino kaj komencis malkovri antaŭ la edzino siajn sekretojn.

— Nu, edzino mia, — li komencis, — vi tre bone scias, ke mi estas saĝa kaj klera homo; kaj des pli bone vi scias, ke Dio destinis min por grandaj aferoj, tion ja ĉiuj scias. Ĉu tiel estas?

— Tiel estas, Haĝi, tiel estas... Nu, kaj kion poste?

— Kaj poste sekvas tio, ke nia filino Lila estos edzino de riĉa fraŭlo.

— Diru tuj al mi, Haĝi, kiu li estas? Kiu prenos nian knabinon? Kiu ŝvatas ŝin?

— Kiu li estas? Mi ne volas diri al vi. Mi ŝatas iom turmenti virinojn, por instrui ilin esti paciencaj. Virinoj devas malmulte scii kaj multe kompreni.

— Mi estas patrino, Haĝi, kaj mi volas scii, kia estos la sorto de mia infano. Mi volas scii, kiu estos ŝia edzo.

Dum la maljunuloj interparolis tiamaniere, la ĉambron eniris junulino

Ljuben Karavelov (1834—1879), eminenta bulgara revoluciulo kaj sociaganto, talenta verkisto kaj publicisto, fondinto de la kritika realismo en la bulgara literaturo.

En „Bulgara Antologio“ (1925) Karavelov estas reprezentita per fragmento el lia plej talenta verkita novelo „Bulgaroj de malnova tempo“ sub titolo „Haĝi Genĉo“ kaj per lia plej populara versaĵo „Arbaro mia, bel-arbar’...“ (Hubava si moja goro).

Ĉi-sube proponas al niaj legantoj fragmentojn el la sama novelo, el la ĉapitroj „Svatado“ kaj „Fianĉiĝo“.

krispaj okulharoj, ili elradiis tenerecon, energion kaj animvarmon; ŝia alta frunto estis bela kaj serena; neĝblanka vizaĝo, persiksimilaj rozkoloraj vangoj kun ĉarmaj kavetoj. Malhele-blonda bukla hararo, silke mola kaj brila, libere falis sur ŝiajn ŝultrojn. Aldonu al ĉio ĉi sveltan staturon kaj maldikan talion, kiun’ ornamis zono kun arĝentaj bukoj; sur la kapo tiu anĝelete havis diafanan, kiel vualo, ruĝan kaptukon. La junulino estis vestita en hejme ellaborita lana robo kun brodaĵoj; sur la robo ŝi havis jaketon el ruĝa drapo, same broditan per blankaj silkaj fadenoj. La robo kovris la kolon kaj la ŝultrojn, sed malkovris ŝian altan bruston sub la delikata silka brustoparto de la ĉemizo, al kiu pasie alpremiĝis vitroperloj kaj korala koliero. En ambaŭ manoj ŝi portis po unu akvokruĉon: unu el la kruĉoj estis verda, la alia — flava, kun verdaj ornamaĵoj.

Kiam Haĝi Genĉo vidis sian filinon, li leviĝis renkonte al ŝi; sed Lila, ekvidinte sian patron alpaŝi al ŝi, pro timo apenaŭ ne ellasis la akvokruĉojn; ŝi tre bone sciis, ke se ŝia kara paĉjo alproksimiĝas al ŝi, tio estas nur por tiri al ŝi la orelojn aŭ por doni al ŝi vangofrapon — ĉe Haĝi Genĉo tiuj agoj estis samtempe puno kaj kareso.

Do Lila ektimis sian patron, sed tre baldaŭ ŝi komprenis sian eraron: nun Haĝi Genĉo eĉ ne pensis tiri orelojn aŭ doni vangofrapojn. Kaptinte per du fingroj ŝian mentonon, ridetante, li dolĉe diris al ŝi:

— Nu, Lila, gratulojn! Mi trovis por vi unu tian fraŭlon, kian vi eĉ en viaj songoj



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

ne vidis. Do tuj kisu mian manon kaj faru antaŭ mi sepdek sep kliniĝojn.

Lila kisis la manon de sia patro kaj, sen diri eĉ unu vorton, malproksimiĝis. „Iru, kresku, nasku infanojn kaj plimultigu la loĝantaron de la tero“, parolis post ŝi Haĝi Ĝenĉo. Eldirinte tiujn vortojn, li denove sidiĝis sur sian lokon.

— Diru, Haĝi, mi petas, diru al kiu vi edzinigos mian infanon? Al kiu vi volas doni mian knabineton? Pro Dio, diru al mi, se vi amas vian familion — petis sian estimindan edzon la povra oldulino kaj amare ploris.

— Se mi rakontos al vi ĉion, kion mi scias, vi aŭ frezeziĝos, aŭ antaŭtempe maljuniĝos, — diris Haĝi Ĝenĉo kaj kuŝiĝis en la angulo sub la ikonostazo.

Post nelonge la bonkora familiestro ekronkis. Avino Haĝulino kovris sian edzon per lanuge mola blua lankovrilo kaj kun spirĝemo direktiĝis al la kuirejo, kie Lila preparis la vespermanĝon.

— Paĉjo estas tre gaja hodiaŭ, — diris ŝi al sia patrino. — Mi de longe ne vidis lin tiel gaja.

— Jes, gaja, tre gaja li estas, — respondis Avino Haĝulino. — Ja li volas doni vin en fremdan domon, al fremdaj homoj...

Lila ruĝiĝis, mallevis la okulojn.

— Sed mi ne scias, al kiu li vin svatas, — daŭrigis la patrino. — Obstina maljunulo, li eĉ al mi ne volas diri, sed mi konjektas... Kaj vi, Lila, ĉu vi konjektas?

La junulino silentis.

— Nu, se vi ne scias, mi diros al vi: al Pavlin, la filo de Liben, li svatas vin. Pavlin estas bona kaj saĝa junulo, ankaŭ lia familio estas bona...

Lila ankoraŭ pli multe ruĝiĝis kaj turnis sian kapon, por ke la patrino ne povu vidi ŝian vizaĝon; sed subite ŝiaj okuloj pleniĝis per larmoj.

— Kial vi ploras, mia kara infano, aŭ Pavlin ne plaĉas al vi? Ja vi konas lin, Lila? Kompreneble, vi konas lin, diru do? —

demandis la patrino sian infanon, tenere rigardante en ŝiajn okulojn.

— Mi konas lin, panjo, — kun larmoplenaj okuloj mallaŭte ekparolis Lila. — Li multfoje prenis mian floron, multfoje petis trinki de mia akvo.

— Do se tiel, diru al mi sincere: ĉu li plaĉas al vi aŭ ne?

— Jes, li plaĉas al mi panjo, li multe plaĉas al mi...

Longe daŭris la interparolo inter tiuj mildaj kaj teneraj koroj. Fine, dajaj kaj feliĉaj, ili sidiĝis por vespermanĝi. Ĉirkaŭ noktomezo la patrino kisis sian filinon sur la frunto kaj iris dormi.

Nun vi jam vidas, kiel Haĝi Ĝenĉo emas konsiliĝi kun sia familio; kaj Avo Liben opiniis, ke Haĝi Ĝenĉo mensogas lin! Se mi devas diri la veron, Lila ĝojus edziniĝi eĉ kun la lasta el la viroj, vidvo aŭ malriĉulo, nur por liberiĝi de la patraj zorgoj kaj de la patra despotismo; sed kiam ŝi eksciis, ke ŝia patro donas ŝin al Pavlin, pro ĝojo ŝi ne povis fermi la okulojn dum la tuta nokto.

La imago de la juna kaj senkulpa junulino ekscitiĝis ĉiam pli kaj pli; dum tiu nokto ŝi ĉion pripensis, ĉion trasentis.

En siaj pensoj ŝi vidis la tutan bildon de sia nuptofesto: kiel ŝi estos vestita, kiel ŝi iros al la preĝejo; kiel ĉiuj ŝin rigardos kaj ŝi sentos ĝenon, honton, timon kaj poste al ŝi fariĝos gaje kaj agrable.

Kiam Lila satiĝis pri tiuj dolĉaj revoj, ŝi kaŝis sian vizaĝon en la kusenon kaj dronis en tiu beata dormo, kiun ĝuas nur la senkulpaj anĝeletoj.

---

La sekvan tagon post la svatado Pavlin aranĝis florbukedeton kaj ekiris al la domo de sia fianĉino. Estis frumateno. Birdetoj salutis la vekiĝon de la granda naturo per siaj gajaj kaj senzorgaj kantoj... La rivero lirlis inter la verdaj bordoj, en ĝia akvo respeguliĝis verdaj salikoj, branĉoriĉaj avelarbustoj kaj ĉio, kio troviĝis sur la bordo. Per unu vorto, ĉie ĉirkaŭe regis beleco, bona kaj gaja etoso, la naturo — tero kaj ĉielo, — estis belega kaj majesta.

La koro de Pavlin estis plena de ĝojo. Li eniris la domon de Haĝi Genĉo, kisis lian manon, kaj ankaŭ la manon de Avino Haĝulino; Lila, vidinte ke venas Pavlin, iris en la alian ĉambron.

— Nu, filo mia, kion vi portas al mi? — demandis Haĝi Genĉo.

— Mia patro sendis min alporti al vi iujn donacojn, — respondis Pavlin.

— Por kiu estas tiuj donacoj?

— Por via domo.

— Mi jam scias, ke tiuj donacoj ne estas por mi, sed por mia filino. Atendu, mi nun vokos ŝin, vi iom interparolu.

Haĝi Genĉo eliris el la ĉambro, sed baldaŭ revenis, kondukante je la mano sian filinon.

— Jen mi donas al vi multekostan gemon — li diris, — kiun mi gardis kiel la pupilon de mia okulo; gardu ĝin ankaŭ vi, mia filo!

Li prenis la manon de Pavlin, metis en ĝin la etan belan maneton de Lila kaj en liaj okuloj aperis larmoj. Ĉu mi devas klarigi, ke la larmoj de Haĝi Genĉo estis hipokritaj — pro la kutimo!

La maljunuloj eliris el la ĉambro, lasinte Pavlinon kaj Lilan solaj, por ke ili povu interparoli, interkontatiĝi. Kiam la maljunuloj eliris, Pavlin kaj Lila longe sidis, rigardis malsupren kaj silentis: Pavlin de tempo al tempo ekrigardis al sia estonta vivkunulino kun ama ekstazo, kaj Lila sopirĝemis kaj rompis la fingrojn. Fine Pavlin emociplene kaj kun tremetanta koro diris:

— Kion mi aĉetu al vi por la fianĉiĝo, Lila? Ĉu silkan ŝtofon por jupo aŭ drapon por peltjako?

— kion vi volas, tion aĉetu — diris ŝi.

— Lila, ĉu vi ĝojas, ke vi estos mia edzino? Ĉu vi amas min Lila?

— Mi tre multe amas vin, Pavlin. Mi estas tiom feliĉa, ke al mi ŝajnas — mi frenezigos pro feliĉo... Kредu, mi estas plej feliĉa el ĉiuj en la mondo!

— Nu, se tiel estas — tre bone, Lila! Mi, Lila, tre multe amas vin, pli ol mian vivon; mi karesos vin, mi dorlotos vin, mi gardos vin kiel oron... Kiel mi sopiras pri la tago de nia edziĝfestoj!...

Sed eniris Haĝi Genĉo kaj la interparolo estis ĉesigita. Pavlin restis en la gastama domo ankoraŭ duonhoron kaj poste revenis hejmen, saltante pro ĝojo.

El la bulgara: Lidia RAEVA

# Verdsemajno kaj varbsemajno

Jaro X.

MAJO 1929

Numero 9



## ВИДИНЪ ВМЪСТО ЛОМЪ

Поради причини, основаващи се на Закона от Министерството на Вътр. Работи се отказа утвърдяването устава на Еспер. Лиго в Ломъ. От друга страна поради стекли се обстоятелства и някои есперантисти от Ломъ се отказват и от активна дейност. Въпреки, че се направиха постъпки за уяснение положението — в Сюза се получи официален отговор, такъв, какъвто се очакваше.

Вземайки всичко предвид и изхождайки от гледна точка на тактичността Ц. К. в заседанието си от 27 Април и г. рѣши тазгодишния конгрес да бѣде в ВИДИНЪ. Това рѣшение се схожда и сѣ желанието на миналогодишния конгрес.

Конгреса ще се състои на 28, 29 и 30 Юлий.

Всичко отнасящо се до конгреса да се изпраща на адрес: Владимиръ Лазаровъ, I сѣдия изпълнителъ — Видинъ.


Говорете се за Видинъ.



*komencas korespondadon. Dum la sama vespero okazas la interkonatiĝo de la novaj kaj malnovaj esperantistoj. Nome post tiu vespero oni devas aranĝi la varbsemajnon. Ĉiu kursano estas membrigata kaj la malnovaj esperantistoj — remembrigataj. Tion ja celas la varbsemajno, kiu estas frukto de l'verda semajno. En Plovdiv oni jam faris la unuan provon. La societo havis nur 20 membrojn. Post la improvizita varbsemajno la membroj duobligis — 46. Ĉu tio ne estas sukceso? Se ĉiu samideano varbos po unu novan membron — sufiĉas. Provu gesamideanoj, kaj estu certaj en via sukceso. Ni venkos. Ni laboru kaj esperu!*

Ivan ŠIVAROV

(„Bulgara Esperantisto“, n-ro 1/1929)








Hristo Nikolaev kun sia filino.

## Sukcesa starto de ILEF-ano

Dum la Dua Internacia Kino-Foto-Festivalo Esperantista, okazinta en Vraca en oktobro 1988, estis aljuĝitaj kvar unuaj premioj en sekcio „Foto“. Ĉi-foje mi konatigos vin kun Hristo Nikolaev, unu el la distingitoj.



Li naskiĝis la 5-an de novembro 1951 en Ovĉa mogila — regiono de Veliko Târnovo. Pri fotografio okupiĝas ekde 1977. Dum la Sesa Festivalo de Amatora Kino-Foto-Arto (1985) Hristo Nikolaev estis distingita per unu ora kaj unu arĝenta medaloj en sekcio „foto“ kaj per bronza medalo en sekcio „kino“.

Lia Esperanta aktivado komenciĝas en 1988, kaj lia unua partopreno en la agado de ILEF estis en Dua Internacia Kino-Foto-Festivalo Esperanta, kie li gajnis unuan premion pri foto kaj duan premion pri lum-bildoj.

Al la legantoj de „BE“ ni prezentas fotojn de Hristo Nikolaev.

Veneta BALEVA,  
sekretario de ILEF

# NEFORGESEBLA SOLENAĴO

Antaŭ 80 jaroj, la 24.XII.1908 en Asenovgrad naskiĝis David Sasonov. Se li ne estus pereinta, se ne estus la faŝismo kaj la persekutoj de esperantistoj, li povus esti nun nia kunvivanto kaj arda esperantisto.

En nia urbo lian nomon portas la strato, kie li loĝis, nia E-societo kaj unu Esperanto-klaso en lernejo „Nevena Jordanova“. Lige kun la ideo pri celebado de la 80-jara datreveno de David Sasonov efektiviĝis vigla kunlaboro de la publikaj organizaĵoj en nia urbo, de nia E-societo kaj lernejo „Nevena Jordanova“.

La solena vespero estis neforgesebla kaj impona dank' al nia E-societo kaj al la Esperanta klaso en lernejo „Nevena Jordanova“.

La solenaĵo okazis en la urba kulturdomo. Ĉeestis la fratinoj de David Sasonov Raŝel kaj Mara Sasonov

el Plovdiv, lia nepo David Sasonov kaj aliaj gastoj el Plovdiv, multaj esperantistoj el nia urbo, lernantoj kaj iliaj gepatroj kaj instruistoj el lernejo „Nevena Jordanova“.

La plej kara gasto de nia solenaĵo estis Sava Dălbokov — prezidanto de BEA. Lia parolo estis programo por esperantistoj kaj dankemo al la heroo, kiu fordonis sian vivon por la libero de nia popolo.

Belegan programon prezentis lernantoj el lernejo „Nevena Jordanova“, sub la gvidado de Velurina Ĉirpanska. Ĉiuj ĉeestantoj ricevis insignon kun surskribo „Esperanto-societo „D. Sasonov“ — Asenovgrad“. La solena vespero estis bonega propagando de la internacia lingvo Esperanto.

Emil ĈIRPANSKI



Sava Dălbokov — prezidanto de BEA, Raŝel kaj Mara Sasonov — fratinoj de David Sasonov kaj Atanas Gaev — honora prezidanto de E-societo „D. Sasonov“ — Asenovgrad, dum la solenaĵo.

## Memore al David Sasonov

David Sasonov okupis elstaran pozicion en nialanda Esperanto-movado: kursgvidanto, tradukisto kaj redaktoro.

Kiam en 1929 ni en Asenovgrad fondis laboristan

Esperanto-societon, la estraro proponis al David gvidi kurson por komencantoj. Li volonte konsentis. Baldaŭ li estiĝis ŝatata instruisto de Esperanto. Al simplanimaj laboristoj li scipovis enkapigi

gramatikajn regulojn kaj paroligi ilin per demandoj kaj respondoj el la ĉiutaga vivo. Post ĉiu leciono li rakontis interesan fakton el la internacia Esperanto-movado, proponis adresojn de kores-

pondemuloj.

Dum la kursoj de la loka neŭtralula societo estis pagataj, David gvidis kursojn senpage kaj eĉ el la propra poŝo pagis por hejtado kaj lumigado de la lernejĉambro.

David konvinkis siajn kursanojn interkonatiĝi perlete-re kun esperantistoj el Sovetio kaj aliaj malproksimaj landoj. Li zorgis, ke la sendataj poŝtkartoj kaj leteroj estu lingve seneraraj kaj sencoplenaj.

David senĉese pliperfektigis en Esperanto, legante aŭtoritatajn revuojn. Li alte taksis la literatur-artan revuon „Literatura Mondo“ kaj la gazeton por beletristiko kaj pliperfektigo „Esperanto-Praktiko“, kies regula kunlaboranto li fariĝis komence de la 30-aj jaroj. Li volonte legis ĉion, kion lia pli aĝa frato Solomon ricevadis: „Heroldo de Esperanto“, „Esperanto“, „Verda Stelo“ k. a.

Por ellabori al si bonan Esperantan stilon, li legis kaj relegis aŭtorojn, kiuj verkis originale en Esperanto: „Hura“ kaj „Viktimoj“, romanoj de Julio Baghy; „Abismoj“ kaj „Saltego trans jarmiloj“ de J. Forge; „Stranga heredaĵo“ kaj „Pio Iŝtar“ de N. Luyken „Idoj de Orfeo“ kaj „Edzino de Potifar“ de Bulhuis; modelaj tradukoj de Kabe, Grabowski, Devjatin, Kalocsay, Krestanov, Atanasov-Ada. Li legis kaj relegis plurajn verkojn de Zamenhof.

David mem komencis riĉigi la esperantan literaturon, tradukante rakontojn de bulgaraj klasikuloj: T. Vlajkov, Elin Pelin, P. J. Todorov, J. Jovkov. Per siaj tradukaĵoj li kunlaboris al la presti-

ĝaj „Esperanto-Praktiko“ kaj „Balkana Konkordo“.

Ni interamikiĝis dank' al Esperanto. Li estis pli klera ol mi kaj pli bone konis la literaturon. Li legis kaj analizis miajn versaĵojn kaj rakontojn. Rimarkinte, ke David interesiĝas pri sociaj aferoj,



mi havigis al li kajerojn de la socipolitikaj revuoj „Sennacieca Revuo“ kaj „La nova epoko“. Ankaŭ „Kumunistan manifeston“ li tralegis kaj „Ŝtato kaj revolucio“ de Lenin. Sekvis revolucia beletristiko: „Disrompo“ de B. Lavrenev; „La submarinistoj“ de Novikov-Priboj; „La morto de Janulas“ de P. Panĉ; „Per voĉo plena“ de VI. Majakovskij; „Socialismo“ de Bezimenskij k. a.

Paŝon post paŝo David, konvertiĝis al marksismo. Li tamen ne restis nur pasia simpatianto. Li memvole aliĝis al nia rondeto (D. Andreev, K. Buzdrov kaj mi), kiu eldonadis monatan PEK-bultenon, destinitan por laboristaj Esperantogazetoj en fremdlando. David reviziis la tradukojn, taj-

pis kaj mem tradukis, ofte pagis por papero kaj aliaj elspezoj.

Sekvis dua paŝo: li fariĝis membro de la malleĝa junlaborista organizaĵo RMS.

Neforgeseblaj por mi estas la tagoj, kiam ni kun David tradukis la faman revolucionan poemon „Septembro“. Eldoni ĝin en nia lando estis danĝere pro la drakona „Leĝo por defendo de la ŝtato“, kiu severe punis la aŭtorojn de revolucia literaturo. Tial ni sendis la manuskripton al EKRELO (eldonejo por revolucia literaturo), kies presejo estis en Moskvo. Nepriskribbla estis nia ĝojo, kiam mi vidis ĝin presita.

Nia revolucia agado vekis suspekton ĉe la polico kaj mi transloĝiĝis al la distrikta centro Plovdiv. Nia PEK-laboro transiris en la manojn de la filio de LEA en Plovdiv. Tamen David ne restis senokupa. Li komencis redakti manskribitan gazeton „Tribuno“. Li sendis al mi regule la revueton. Bedaŭrinde, en nia lando ĝi ne troveblas pro policaj traserĉoj.

Kiam post la faŝista renverso (1934) la laboristaj esperantistoj organizite transiris en la vicojn de BEA, David komencis labori aktive en la neŭtrala movado. Li regule vizitis la kongresojn de tiu ĉi landa organizaĵo kaj partoprenis la debatojn, farante utilajn rekomendojn por plifortigo kaj demokratiigo de la Esperanto-movado en nia lando.

Dum daŭris la intercivitana milito en Hispanio, li regule ricevadis gazeton „Popola Fronto“ kaj tradukis informojn pri la bataloj de la interbrigadistoj por proponi ilin en la loka gazeto, kies

ĉefredaktoro estis amiko de Esperanto.

Lia prestiĝo de sociaganto kreskis en la okuloj de la urbanoj kaj oni elektis lin en la tuturban packomitaton. Samtempe la turisma societo elektis lin sian prezidanton. Suspektata kaj atente observata, li tamen kaŝlaboris en la eksterleĝa Laborista Partio. Li ne ĉesigis sian agadon eĉ kiam oni enkondukis la fifamajn kontraŭhebreajn leĝojn.

Iumatene amiko el Ase-  
novgrad renkontis min en  
Plovdiv kaj avertis, ke David

estas arestita kaj troviĝas en la kelo de la departementa polico. Mi estis certa, ke li nenium denuncos, sed ĉu li eltenos fizike? Lia korpo, kontraste al la firma spirito, estis malforta. Liaj pulmoj estis malsanaj. La polic-  
esploristo vipis lin sur la brusto kaj la plandoj, postulis konfeson „pri konspiro por renverso de la registaro“, sed la arestito silentis kaj kraĉis sangon.

Senfortan kaj malsanan oni ekzilis lin en malproksiman vilaĝeton de Suda Rodopo. Sen kuracista prizor-

go, li mortis la 13-an de septembro 1942. La vilaĝestro traserĉis la poŝojn de la mortinto, trovis iom da mono kaj mendis ĉerkon. Oni transportis lin al liaj hejmanoj, kiuj enterigis lin en la hebrea tombejo.

Konvenaj por li estas la versoj de Nekrasov pri Dobroljubov:

*Tre frue venis via lasta hor',  
el viaj manoj falis saĝa plum'  
kaj estingiĝis lampo de raci!  
Ja kia koro ĉesis bati nun!*

Hristo GOROV



Afganaj infanoj, sub la gvido de Nevena Krâsteva, prezentis E-programon antaŭ la esperantistoj de sofia societo „Stefan Minkov“.

Foto: Kolju MARKOV

## LITERATURA VESPERO

**Burgas.** La 12-an de januaro j. k. la E-kulturdomo organizis vesperon, dediĉitan al la verkado de la nuntempa E-poeto, tradukisto kaj teatroestro Nikola Stranĝanski. Membroj de la loka literatura rondo deklamis sonetojn de la poeto. Junpionira floro plenumis kantojn, kies tekstoj estas tradukitaj de li. Respondante al la demandoj de la geesperantistoj, la poeto ra-

kontis rememorojn el sia riĉa agado.

La membro de CE de BEA Elena Stojkova enmanigis al Nikola Stranĝanski la jubilean oran medalon „100 jarojn Esperanto“, per kiu la Centra Estraro de BEA distingas la poeton pro lia kontribuo al E-movado.

Enjo ENEV

# OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

SENDEPENDA LINGVO-INSTITUCIO FONDITA DE D-RO L. L. ZAMENHOF EN 1905

## KOREO

### I. Faktoj.

Ni konstatas, ke

a) en gravaj dokumentoj (Mondmapo, poŝatlaso, P. I. V.) estas uzataj la landnomo **Koreo** kaj ĝia derivaĵo **Koreano**.

b) en la protokolo de la 3-a Kunsido de la „Lingva Komitato de KEA“ (Korea Esperanto-asocio), kiu okazis la 9-an de Aprilo 1984 estis alprenitaj decidoj. Ni citas:

1. „La esperanta landnomo de nia lando „Dehanminguk“ estas **Koreujo**“.

2. „La esperanta gentnomo de nia gento estas koreo.“

### II. Rimarkoj

a) La „decidoj“ de KEA nek estis prezentitaj al la Akademio, nek sankciitaj de ĝi. Ili ne povas esti precedentoj por similaj decidoj nek esti oponitaj al decidoj de la Akademio.

b) La kontrasto inter punktoj a) kaj b) de § I montras, ke ni troviĝas en tipa kazo antaŭvidita de la 2-a rekomendo pri landnomoj; estas konflikto inter la kategorioj por unu sama nomo. Sekve por decidi ĉu **Koreo** nomas landon aŭ homon ni devas obei la 15-an regulon de la Fundamento.

### III. Internacieco

Ni konstatas,

a) ke ekzistas monda internacieco por la landnomo **\*Kore-**: ĝi koncernas ne nur la Latinidajn, Germanidajn kaj Slavajn lingvojn kune kun la ceteraj Eŭropaj, sed ankaŭ la Sanskritidajn kaj la Iranajn, ankaŭ la Afrikajn kaj Aziajn kiel ekz-e la Indonezia. Ĉiuj devenas de la nomo de Korea dinastio „Gaoli“, pri kiu raportis Marco POLO.

b) la sama nomo **Gaoli** estas plu uzata en kelkaj lingvoj Aziaj: nome, en la Ĉina **Gaoli** kaj en la Taja: **Kaoli**.

c) La Koreanoj apartenas al unu sola etno, kiu nomiĝas sialingve: Han. Sur la bazo de tiu nomo la Sud-Koreanoj nomas sian landon ordinare: Hangug t. e. „Hanlando“,

vorto kiu povus utili kiel sinonimo. Japanoj imitis tiun nomon per: Kankoku.

### IV. Konkludoj

a) La formo **Koreujo** estas kontraŭfundamenta. La sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas **Koreo** kaj ties anoj estas **Koreanoj**.

b) Ne povas esti oponita al tiu konkludo la fakto, ke unuece ĉiuj diras **Japan-ujo/-io** kaj **Ĉin-ujo/io**. Al ili estas aplikebla la rekomendo 1-a; cetere tie la internacieco ne estas unueca, nek monda. Ankaŭ ne eblas oponi la fakton, ke oni diras **Franc-ujo/io** por la Franca **France**: temas pri vorto de la Fundamento kaj estas egaleco inter la internaciecoj de **Frans-** kaj de **\*Franci-** por la landnomo.

c) Nur tiel ni povas Retrovi la unuecon de nia lingvo.

## EGIPTO

### I. Faktoj.

Ni konstatas, ke

a) en la grava traduko de „La Faraono“ de Prus (KABE 1907—1908 reeldono en 1957) nia plej eminenta tradukisto konscie kaj konstante tradukis la Polan **Egipt** per **Egipto**. Ne eblas nei, ke tiu traduko apartenas al nia literatura tradicio kaj kune kun ĝi la landnomo **Egipto**.

b) en la ĉiutaga tradicio oni uzas la formojn „Egiptujo“ aŭ „Egiptio“.

c) iuj volus distingi inter la malnova antikva Egiptujo kaj la hodiaŭa Egiptio, eble loĝata de Egiptianoj.

### II. Rimarkoj.

a) La distingo inter Egiptujo kaj Egiptio malfaciligus la ligvon kaj eĉ la komprenon. Cetere la antikvaj Egiptanoj nomis sian landon **Kemet**, kiu povas liveri la nonom **Kemeto** „Nigra Tero“; ili havis ankaŭ diversajn bildajn nomojn, kiel ekzemple, **Novhi** — **Kah** (Sikomor-Tero“) k. a., ĉiuj nomantaj la landojn.

b) La kontrasto inter punktoj a) kaj b) de § 1 montras, ke ni troviĝas en tipa kazo antaŭvidita de la 2-a rekomendo pri landnomoj; estas konflikto inter la kategorioj por unu sama nomo. Sekve por decidi ĉu **Egipto** nomu landon aŭ homon, ni devas obei la 15-an Regulon de la Fundamento.

### III. Internacieco.

a) Ni konstatas, ke ekzistas monda internacieco por la landnomo **Egipt-**: ĝi koncernas ne nur ĉiujn Eŭropajn lingvojn, sed ankaŭ ĉiafamiliajn lingvojn tra la mondo. La etimo estas, tra la Latina **Aegyptus** kaj la antikva Greka, la Egipta urbonomo Haj-Ĥu-Phtah, almenaŭ laŭ la plej probabla hipotezo de la specialistoj.

b) La malmultaj lingvoj (Hinda, Benga-

la, Persa, Turka, Araba, Hebrea, Indonezia, Svahila...), kiuj uzas alian nomon, uzas unuanime la landnomon \*-**misir** aŭ variantojn de tiu.

c) En ĉiuj lingvoj la nomo de la ano estas derivita (Egipt-an; misir-an)

### IV. Konkludoj

a) la sola formo, kiu obeas la Fundamenton estas la landnomo **Egipto**; ties anoj estas **Egiptanoj**.

b) obei la Fundamenton estas ankaŭ omaĝi al nia granda verkisto kaj tradukisto KABE, de lia plena nomo Kazimierz BEIN. Lia traduko estas ankoraŭ aktuala.

c) nur tiel ni povas trovi la unuecon de nia lingvo ankaŭ en la tempo.

El „La letero de l’Akademio de Esperanto”  
(n-ro 5/1988)

## RESPONDE AL LA DISKUTO

*En la oktobra numero de „Bulgara Esperantisto”, 1988 denove temas pri disputo koncerne la landnomojn. Pri tio oni jam sufiĉe multe skribis en aliaj Esperanto-eldonoj, inkluzive de la fakaj, ekz, en „Filologo”.*

*Por ĉiuj filologoj estas tute evidente, ke nur praktika uzado de konkurantaj geografiaj nomoj fare de la Esperanta popolo decidus la sorton de tiu aŭ alia formo. Sciencistoj ne devas, laŭ nia opinio, ĉesi interesiĝi pri*

*la problemoj, sed ili prefere dediĉu sian atenton al novaj landnomoj kaj al la tendencoj de la natura kaj demokratia evoluo de la formoj aperintaj kaj aperantaj en la Internacia Lingvo interne de landaj Esperanto-komunumoj.*

*La opinio esprimita de estimata V. Oljanov, ŝajnas esti la plej objektiva, konvinka kaj konsiderinda.*

**Doc. Vjaĉeslav HROMOV,**  
Tallinn, Estonio.

## FAKA VORTARO

En numero 7—8 1988 de „Bulgara Esperantisto” sur paĝo 26 mi legis la informon „Plantoj-simboloj” de Dimitâr Haĝiev. Por mi tio estis tre interesa, ĉar ĝis nun mi opiniis, ke bulgaroj ne interesiĝas pri blazonoj kaj simboloj. Almenaŭ neniam mi legis pri tio en bulgaraj eldonoj. Dankon al vi!

Nun mi ankaŭ okupiĝas pri blazonoj kaj ties simboloj kaj kompilas E-vortaron pri tio. Jam estas pretaj ĉirkaŭ 750 terminoj en kvin lingvoj: Esperanto, angla, germana, franca kaj rusa; mi serĉas la ekvivalentojn ankaŭ en aliaj lingvoj. Do, mi estus tre ĝoja trovi samfakulojn en Bulgario.

Nun en nia lando estas en preparo kelkaj libroj pri urbaj blazonoj. Pli oftas aperigado de specialaj insignoj, bildkartoj. Estus tre interese interŝanĝi tion kun bulgaraj geamikoj.

Krome, mi tre petus aperigi en via gazeto blazonon, ekz. de urbo Sofio.

**Nikolaj STARODUBCEV,**  
vl. N. Ostrovskogo, 12—16, SU—340120 Do-  
neck,  
USSR.



La blazono de Sofio.

# ADRESARO

(Daŭrigo de n-ro 3/1989)

## DEPARTEMENTO DE RAZGRAD

7200 Razgrad  
ul. „Ivan Vazov“ 38 vĥ. 3, ap. 33  
Radka Stojanova  
E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“

7280 Ĥlebarovo  
Obŝtinski komitet na BKP  
Marinka Penĉeva  
E-societo „Avangardo“

7300 Kubrat  
ul. „Stracin“ 16  
Ĥristo Dimitrov  
E-societo „Progreso“

7400 Isperiĥ  
ul. „Rosica“ 51  
Donka Nikolova  
E-societo „Progreso“

7290 Loznica  
ul. „G. Kirkov“ 2  
Ginka Ĥristova  
E-societo „Solidareco“

7272 Senovo  
bl. „Biser“ et. 1, ap. 2  
Ginka Petrova  
E-societo „Progreso“

7000 Ruse P. K.  
Nadeĵda Sirkova  
E-societo „Libero“

7169 Batiŝnica  
ul. „G. Dimitrov“ 41  
Veliĉka Petrova  
E-societo „Vilaĝa Voĉo“

7100 Bjala  
ul. „G. Dimitrov“ 63  
Petko Vladov  
E-societo „Paco“

7174 Borovo  
ul. „Car Simeon“ 9  
Ivan Raĉev  
E-societo „Lumo“

7150 Dve mogili  
wl. „Asen Zlatarov“ 2  
Nejko Nejkov  
E-societo „L. L. Zamenhof“

7131 Polsko Kosovo  
vl. „G. Dimitrov“ 86  
Jordan Atanasov  
E-societo „Frateco“

7080 Vjatovo  
ul. „V. Drumev“ 5  
Jordanka Filevska  
E-societo „Aŭtoro“

7500 Silistra P. K. 11  
E-societo „Amikeco“

7700 Târgoviŝte P. k. 174  
Todor Todorov  
E-societo „Amikeco“

7970 Antonovo  
ul. „Tuzluŝki geroj“ 75  
Nikolina Panĉeva  
E-societo

7800 Popovo  
ul. „Asen Zlatarov“ 27  
Angel Gjaurov  
E-societo „Homeco“

7860 Slavjanovo  
ul. „G. Milev“ 3  
Ilija Mirĉev  
E-societo „Iv. Stojanov“

(Daŭrigo en n-ro 5/89)



## TENTO

Hela firmamento. Varma somera tago, Ekster la urbo meandras<sup>1)</sup> ĝiaj akvoj kaj milde karesas la orelon. Sur la liva<sup>3)</sup> bordo kreskas floranta plorsaliko. Sub ĝia ombro sidas kaj ploras junulino. Preteriras viro.

— Kial vi ploras, juna knabino?

Respondo ne sekvis. Li ripetis sian demandon. Iom post iom la ploro de la junulino svenis<sup>4)</sup>.

— Nu, konfesu vian aflikton. Ĉu vi spertis malagrablaĵon? Eble mi provos helpi al vi.

Post suspiro<sup>5)</sup> la junulino ekparolis.

— Ege malbela mi estas. Neniu junulo volas amin-dumi min. Mi estas treege soleca. Neniu vizitadas min. Mi havas pli junan fratinon. Ŝi estas simpla knabino, eĉ nelegoscia, sed ĉarme bela, vigla kaj gajhumora. Tage kaj nokte ŝin serĉas junuloj por konduki ŝin al promonado, ekskursoj, al balo aŭ kafejo. Ŝi vere felic-  
ĉas...

— Pri kio vi okupiĝas, junulino?

— Mi estas studentino pri literaturo.

— Supozeble vi posedas hejman bibliotekon.

— Jes, tre riĉan! En ĝi estas centoj da klasikaj verkoj de Homero, Eŝilo kaj Eŭripido, de Gogolj kaj Goethe, de Voltaire kaj Moliere...

— Verdire, eta junulino, vi vane ĉagrenas. Ja vi posedas trezoron, pri kiu ĉiu homo povus envii vin. Senĉese vi povas esti en spirita kontakto kun ĉiuj geniuloj de la monda kulturo. Tio signifas, ke vi vivas ne nur en la nuno, sed ankaŭ en la antikvaj tempoj.

La junulino iom post iom trankviliĝis, la vortoj de la nekonato konsolis ŝin. Ŝi esprimis sian dankon per tremanta voĉo.

— Nedankinde! — replikis la preterpasanto. Li ĝisis kaj ekiris. Post du aŭ tri paŝoj tamen li haltis, malrapide turnis sin al la junulino kaj demandis:

— Permesu, simpatia knabino, ĉu vi bonvolos doni al mi la adreson de via fratino?...

CYDRA

### Glosoj:

1) Meandri — zigzagi

2) Lirlo — mallaŭta bruo de fluanta torento

3) Liva — maldekstra

4) Sveni — malrapide malaperi

5) Suspiri — sopiri

## Kolhida fazano



Legendo rakontas, ke iam la argonaŭtoj, dum iu el siaj marŝoj al Kolĉido eltrovis mirindan birdon. Matene, ĉe sunleviĝo, ĝia plumaro brilis kiel oro. Tio estis la kolĉida fazano...

En ĉiu legendo estas iom da vero. La bulgaraj ornitologoj asertas, ke antaŭ multaj jarcentoj la kolĉida fazano estis parto de la faŭno de Sudorienta Eŭropo. Nun la scienco estas kategoria: la malsupra fluo de rivero Tunĝa, en la regiono „Dolna Topĉija” — proksime al urbo Elĥovo, estas la ununura loko en Eŭropo kaj en la mondo, kie sur teritorio de 6 000 m<sup>2</sup>, nestas la vera kolĉida fazano.

En 1960 tiu ĉi regiono estis proklamita nacia rezervejo. Ĝi estas enskribita en la Libro de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, kiel unu el la plej valoraj kaj signifaj rezervejoj — unikaĵo en Eŭropo.

Kio estas interesa pri la bredado de la kolĉida fazano? Kiril Georgiev, direktoro de la rezervejo, fiere deklaris, ke oni ne ŝparas fortojn kaj rimedojn por plimultigo de la fazanoj. Ĉiujare ĉirkaŭ 3 000 gefazanojn oni metas en specialajn kaĝojn, por eviti mik-




## en *Bulgario*

sadon. Tiamaniere fine de la somero eloviĝas pli ol tridek mil fazanidoj, kiujn oni translokigas en la rezervejon kaj en aliajn regionojn de la lando. Sed la originajn ecojn de la speco konservas nur tiuj birdoj, kiuj vivas en la rezervejo „Dolna Topĉija”. Kial? Ĉar la mikroklimato en tiu ĉi virga arbaro estas plej konvena por ili. La birdoj vivas meze de abunda vegetaĵaro, dornoriĉaj arbustoj, sovaĝaj plantoj. La tero ĉi tie estas ĉiam humida kaj riĉa je moluskoj, diversaj vermoj, multe da insektoj, kiuj prezentas la ĉefan nutraĵon, de la fazanoj. Plia menciinda detalaĵo — por konservi la fazanon tia kia ĝi estis antaŭ jarcentoj, ĉiujare oni praktikas krucadon kun sovaĝaj fazanoj.

En tiu ĉi virga arbaro loĝas tiel same vulpoj, musteloj, ŝakaloj, gufoj kaj ankaŭ iu interesa speco de ardeoj, kiuj venas el Afriko, kaj dum la vintro ili denove revenas en la varman kontinenton. Kvankam multaj danĝeroj minacas la kolĉidan fazanon, dank'al la zorgoj de la homo ĝi sukcese vivas kaj plimultiĝas. La viando de tiu ĉi birdo estas gastronomia delikataĵo.

La kolĉida fazano kun sia longa vosto, kun du plumoj sur la kapo kaj fajroruĝaj vangoj estas vere fenomeno de la bulgara naturo.

Stanka DIMITROVA



## AMUZA ZODIAKO



**ŜAFO**  
(21.03—21.04)

— *Pli sentima ol Ŝafar' ne estas!* —  
*diras ili: brustoŝvel' atestas.*  
*Ties brav' ne estas refutata —*  
*ĉi-kvalito ege preferata!*

*luj multon scias, divenemas,*  
*aŭ sur nervoj „takte“ ekludemas.*  
*Ĵetas sin freneze kun la kornoj,*  
*sub la risko de surkapaj dornoj.*


*En batalo ili tro kuraĝas —*  
*por defendi sian rajton saĝas.*  
*Artistecas, majstre elokventas,*  
*peti ja ne ŝatas, ĉar potencas.*

*Stratojn ofte ĉe ruĝlum' trairas,*  
*laŭ reguloj vivi ne deziras.*  
*Tutan mondon ekrenversos, se deziros,*  
*kaj jarcent' dudeka la tridekan eksimilos.*


*Famas do ilia ĵaluzemo,*  
*fiereco, bono, laboremo.*  
*Sed neniel pretas ĝisatendi*  
*kaj pro perdo ia vee plendi.*

*Sciu: ambaŭ seksoj tro spitemas —*  
*per ĉi-eco oni ilin rekonemas!*  
*Ili gardu sin kontraŭ Pesilo,*  
*ĉar ĝi gvatas, persekutas ilin...*

Esperantigis: Asen JOSIFOV



Malkovru la naŭ diferencojn inter la du desegnaĵoj.  
Inter tiuj, kiuj rimarkis la diferencojn kaj priskribis ilin, la redakcio lotumos Esperantan gramofondiskon.



# Deziras korespondi

## BULGARIO

ROSEN KATERINOV (juna inĝeniero) — 1504 Sofio, ul. Ŝejnovo 8 — kun ĉl pri turismo.

DANIELA LJUBOMIROVA (17-jara) — 2200 Slivniĉa, Sofia obl., ul. 9 maj 2 — kun italaj samaĝuloj, Esperante kaj itale, pri ĉt.

KONSTANTINKA ARSOVA (57-jara, maŝinteknikistino) — 1233 Sofio ĵ. k. Baniŝora, str. „Višovgrad“, 22, vñ B, ap. 80 — kun ĉl pri literaturo, belarto kaj muziko.

ANELIA SAVTOVA (32-jara, dentkuracistino) — 3400 Miĥajlovgrad, ul. Ĵitomirska 1 bl. Prosveta, ap. 1 — kun gekolegoj el.ĉl.

ATANAS BANĈEV — 8690 Zimnica, Burgaska obl. ul. Lenin 14 — kun ĉl pri ĉt.

ANA ZAMFIROVA (36-jara flegistino) — 7200 Razgrad, ul. Lajpcig 49 — kun ĉl pri ĉt.

VASILKA KOLEVA (42-jara oficistino) — 7200 Razgrad, ul. Stefan Raŝev 50 A ap. 1 — kun ĉl pri ĉt.

GINKA CANĈEVA (39-jara instruistino) — 7200 Razgrad, kv. V. Levski, bl. 3, ap. 18 — kun ĉl pri ĉt.

VESELKA PANAJOTOVA (20-jara oficistino) — 7200 Razgrad, kv. Porojŝte, ul. Narcis 3 — kun ĉl pri ĉt.

ELENA GEORGIEVA (42-jara oficistino) — 7200 Razgrad, ul. Abritus 13 D, ap. 10 — kun pri ĉt.

IVANKA IVANOVA (51-jara oficistino) — 7200 Razgrad, ul. Dimitar Canev 15-a — kun ĉl pri ĉt.

PANAJOT PANAJOTOV (24-jara oficisto) — 7200 Razgrad, ul. Baĉo Kiro 6 — kun ĉl pri ĉt.

## BRAZILO

OSVALDO NOVAIS JUNIOR (24-jara studento) — 35 420 CEP, Passagem de Mariana — Mariama — MG, Rua do Comércio, 594 — kun ĉl pri ĉt.

CARLOS MONTAGNA (24-jara) — Pelotas RS, Rua gen. Osorio 1003 — kun ĉl pri ĉt.

## HUNGARIO

JUDIT BALOGH (lernantino) — 5720 Sarkad, Vasut u. 2, Ady Endre Gimnazium — kun francaj gejunuloj pri ĉt.

JANOS ISZÁLY (lernanto) — H—5726 Mehekerek, Alkotmany u. 15.

ILONA HORGOSI (lernantino) — H—5553 Kondoros, Arany Jonos u. 20 — kun bulgaraj kaj francaj gejunuloj pri ĉt.

## SOVETUNIO

RUSLAN MAVLJUDOV (31-jara) — 465032, USSR, Gurjev, 3-a m-n, d. 7a, kv. 85 — kun ĉl pri ĉt. Kolektas PM pri aviado kaj surtablaj ludoj de diversaj popoloj.

LILIA MIKLJAEVA (50-jara ekonomiistino) — Moskva, Leninskij prospekt, d. 89, kv. 324 — kun ĉl pri ĉt.

ALEKSANDR BALABKIN (20-jara studento de fremdaj lingvoj) — 603081 Gorĵakij—81, pr. Gagarina 82—321 — kun ĉl pri E-kantoj, proponas interŝanĝon.

LJUDMILA PROKOFIEVA (24-jara inĝenierino) — 603018 Gorĵakij—18, „Krasnij Perekop“ 43—1 — kun ĉl pri sporto k. a.

NATALIA IVĈENKO (21-jara junulino) — 603122 Gorĵakij—122, „Generala Ivlieva“ 32/1—87 — kun ĉl pri ĉt.

SVETLANA SMIRNOVA (24-jara inĝenierino) — 603069 Gorĵakij—69, „Oreĥovskaja“ 28 — kun gejunuloj pri fotado k. a.

LJUDMILA GAVŜKINA (30-jara inĝenierino) — 603016 Gorĵakij—16, „Aftomeĥaniĉeskaja“ 11—30 — kun ĉl pri ĉt.

DUNA KVASOVA (20-jara studentino) — 603000, Gorĵakij — centro, Gogolja 8A—1 — esperante, angle kaj pole, — kun ĉl. pri ĉt.

MARINA ŜLJAPINA (2-jara studentino de fremdaj lingvoj), 603081, Gorĵakij—81, pr. „Gagarina“ 82 — esperante kaj germane, kun ĉl pri ĉt.

GALINA DENISOVA (19-jara studentino) — 603081, Gorĵakij—81, pr. „Gagarina“ 82 — kun ĉl pri ĉt.

SERGEJ KAREV (22-jara studentino), 603005 Gorĵakij—5, Piŝkunova 1 11—413 — kun ĉl pri ĉt, esperante kaj angle.

## FILATELO

*Antaŭ ne longe estis emisiitaj du poŝtmarkoj de la serio „Kultura-historia heredaĵo de la regiono de urbo Kârĝali. Objekto de la markoj estas du ikonoj: „Sankta Joano Antaŭulo“ (de la jaro 1592, konservata en vilaĝo Bjala poljana) — valoro de 5 stotinkoj, kaj „Sankta Georgo mortigas la drakon“ (de la jaro 1841, vilaĝo Drabuŝna) — valoro de 8 stotinkoj.*

*La markoj estas presitaj per multkolora ofseto en la presejo por valoraĵoj en Lejpcigo (GDR). Formato 28×50 mm (vertikale), dentumo 14. Papero blanka, gumita, pure celuloza. Eldonkvanto: po 8 000 000 ekzempleroj de ĉiu valoro.*

*La poŝtmarkoj estas ellaboritaj laŭ projekto de la pentristo Ljudmil Ĉeĥlarov.*

Draguŝko PETROV

СВ. ИОАН ПРЕДТЕЧА · 1592



НР БЪЛГАРИЯ

поща 5 см

с. Бяла поляна, Кърджалиуско

СВ. ГЕОРГИ УБИВА ЗМЕЯ · 1841



НР БЪЛГАРИЯ

поща 8 см

с. Драбушна, Кърджалиуско

# Esperanto en radio

La elsendhoroj estas laŭ Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

## ĈIUTAGE

**05.00—06.00 Varsovio**, 200 m (1503 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90 m (6135 kHz), 41.27 (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL—00—950 Warszawa, Pollando.

**11.00—00—11.25 Varsovio**, 41.99 m (7145 kHz), 31.50 m (9525 kHz).

**11.00—11.30 Pekino**, 43.13 m (6955 kHz), 31.64 m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

**13.00—13.30 Pekino**, 25.75 m (11650 kHz), 19.50 m (15385 kHz).

**15.30—15.55 Varsovio**, 49.22 m (6095 kHz), 41.18 m (7285 kHz).

**16.30—16.55 VARSOVIO**; 49.22 m (6095 kHz), 41.18 m (7285 kHz).

**20.00—20.30 Pekino**, 40.16 m (7479 kHz), 32.03 m (9365 kHz), 30.10 m (9965 kHz).

**21.30—21.55 Varsovio**, 200 m (1503 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 49.22 m (6095 kHz), 41.18 m (7285 kHz).

**22.30—23.00 Pekino**, 30.42 m (9860 kHz), 26.05 m (11515 kHz).

## LUNDE

**13.30—13.40 Berno**, 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH—3000 Bern 15, Svislando.

## MERKREDE

**01.15—01.25 Berno**, 49.22 m (6095 kHz), 48.90 m (6135 kHz), 30.85 m (9725 kHz), 30.35 m (9885 kHz), 24.93 m (12035 kHz).

**03.15—03.35 Berno**, 48.90 m (6135 kHz), 30.85 m (9725 kHz), 30.35 m (9885 kHz), 24.93 m (12035 kHz).

**07.45—07.55 Berno**, 31.38 m (9060 kHz), 21.92 m (13695 kHz), 16.38 m (17830 kHz), 13.83 m (21695 kHz).

**10.45—10.55 Berno**, 25.14 m (11935 kHz), 22.00 m (13635 kHz), 19.27 m (15570 kHz), 16.83 m (17830 kHz).

**13.15—13.25 Berno**, 25.65 m (11695 kHz), 22.00 m (13635 kHz), 19.82 m (15135 kHz), 19.27 m (15570 kHz), 16.83 m (17830 kHz), 13.83 m

(21695 kHz).

**15.15—15.25 Berno**, 21.92 m (13685 kHz), 19.44 m (15430 kHz), 16.83 m (17830 kHz), 13.87 m (21630 kHz).

**17.15—17.25 Berno**, 30.35 m (9885 kHz), 25.09 m (11955 kHz), 19.44 m (15430 kHz), 19.32 m (15525 kHz), 16.83 m (17830 kHz).

**22.15—22.25 Berno**, 50.29 m (5965 kHz), 30.58 m (9810 kHz), 30.35 m (9885 kHz), 24.93 m (12035 kHz).

## JAŬDE

**06.00—06.15 Vatikano**, 186 m (1611 kHz), 48.01 m (6248 kHz), 41.38 m (7250 kHz), 30.75 m (9755 kHz), 25.61 m (11715 kHz).

Radio Vatikana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I—00193 Roma, Italio.

**13.30—13.40 Berno**, kiel lunde.

**21.25—21.35 Tallinn**, 290 m (1035 kHz), 50.63 m (5925 kHz).

Nur la unuan kaj trian jaŭdojn de la monato. Eesti Raadio, Esperanto-fako, SU—200100 Tallinn, Estonio, Sovetunio.

## SABATE

**13.30—13.40 Berno**, kiel lunde.

**20.00—20.20 Romo**, 41.24 m (7275 kHz), 30.90 m (9710 kHz), 25.42 m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C. p. 320, Centro Corrispondenza, I—00100 Roma, Italio.

**Berno**, kiel merkrede.

## JIMANĈE

**08.00—08.20 Havano**, 31.50 m (9525 kHz). Radio Habana Cuba, Esperanto-sekcio, Apartado 70—26, La Habana, Cuba.

**09.30—09.55 Vieno**, 48.74 m (6155 kHz), 21.85 m (13730 kHz), 19.47 m (15410 kHz). O. R. F., Esperanto-fako, A—1136 Wien, Aŭstrio.

**09.50—10.00 Budapeŝto**, M. F. 67.05 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pecs, Pecs, Esperanto, Pf. 200, H—7601 Pecs, Hungario.

**09.20—09.30 Tallinn**, kiel la antaŭa jaŭdo.

**17.00—17.20 Havano**, 31.41 m (9550 kHz), 25.59 m (11725 kHz), 25.51 m

(11760 kHz), 25.26 m (11875 kHz), 19.70 m (15230 kHz), 19.56 m (15340 kHz).

**20.00—20.10 Vatikano**, 570 m (526 kHz), 196 m (1530 kHz), 48.47 m (6190 kHz), 48.01 m (6248 kHz), 41.38 m (7250 kHz), 31.17 m (9625 kHz), 31.10 m (9645 kHz), 25.64 m (11700 kHz), 19.84 m (15120 kHz), kaj MF 93.3 MHz, 96.3 MHz, 105.0 MHz (ankaŭ je festotagoj).

**20.30—20.55 Vieno**, 50.46 m (5945 kHz), 48.74 m (6155 kHz), 21.85 m (13730 kHz).

**22.00—22.20 Havano**, 25.10 m (11950 kHz), 19.80 m (15155 kHz).

**22.40—23.00 Havano**, 49.50 m (6060 kHz), 25.43 m (11795 kHz), 25.38 m (11820 kHz), 25.06 m (11970 kHz).

**22.45—23.00 Zagrebo**, 262 m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU—41000 Zagreb, Juqoslavio.

## DIREKTITAJ ONDOJ

**Berno**: je la 01.15 h al Centra Ameriko kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15 al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45 h kaj 10.45 h al Malproksima Oriento; je la 13.15 h al Proksima Oriento kaj Azio; je la 15.15 h al Proksima Oriento; je la 17.15 h al Arabio kaj Afriko; je la 22.15 h al Suda Ameriko. **Havano**: je la 22.00 h al Eŭropo, Afriko kaj Proksima Oriento. **Pekino**: je la 11.00 h al Japanio kaj Koreo; je la 13.00 h al Sudorienta Azio; je la 20.00 h al Eŭropo; je la 22.30 h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 1530, 9625, 11700 kaj 15120 kHz je la 20.00 h al Afriko. **Vieno**: 13730 kHz je la 20.30 h al Suda Afriko, 15410 kHz al Proksima Oriento.

## SEZONA HORŜANĜO

Ekde la 26-a de marto 1989 la elsendoj el Berno (nur la eŭropa programo je 13.30 h), Budapeŝto, Tallinn, Vatikano, Zagrebo estos aŭskulteblaj horoj pli frue laŭ UTC.

## ALIAJ STAĈIOJ

(regiona aŭdebleco; horoj laŭ loka tempo) **Brazilo**: Sorocaba (ZYK 669), 1080 kHz, vendrede, 21.00—22.00 h; Rio de Janeiro (ZYJ 462), 1400 kHz, dimanĉe 19.30—19.45 h (Brazila Spiritisma Federacio).

(El „Esperanto“, n-ro 1/89)

# PRINTEMPO VENIS

## BULGARA POPOLKANTO

ISSN—02—04—8701

*Kiom feliĉas mi, ĝojas,  
ĉar la printempo jam venis.  
Ĉio eliris al herbo,  
dombestoj, hola, havaĵoj:  
la grizaj brutoj — arbare,  
nigraj ĉevaloj — kampare;  
da ŝafinetoj po miloj,  
da kaprinetoj po centoj.*

*Ĉiuj estaĵoj vekigis,  
Ĉiuj dombestoj bonfartas —  
vivaj kaj sanaj, kaj gajaj,  
ĉiuj sin paŝti ekiris!*

*Plugas plugisto kampare  
la belajn agrojn ebenajn  
kaj la vastegajn novalojn;  
bovparo kiel anĝeloj  
kun amaranta plugilo  
kaj jungstangetoj ocimaj.  
Forte ocimo odoras,  
ĉion vivantan jam vekis.*

*Ĉiuj dombestoj vivantaj,  
ĉiuj post ĝi tuj ekiris,  
ĉiuj al dio preĝadis:  
— Al ni ho Dio, vi donu  
jaron ĉi tiun plej bona:  
sanon kaj vivon al ĉiuj,  
al la plugisto — abundon!*

Kiel unu el la plej belaj verkoj ankaŭ nun brilas sur la alta pinto de la bulgara popola poezio ĉi tiu kanto kun oksilaba verso kaj nesimetria cezuro post la kvina silabo — metriko, karakterizanta duonon de la bulgaraj popolkantoj. Laŭ modernaj reconstruoj de la plej malnovtempa komunhindeŭropa versfarado ĉe ĝi estis uzata la mallonga oksilaba versometro kun simetria cezuro 4+4 aŭ nesimetria 5+3 (en eposa verso) kaj longaj versometroj 10- aŭ 12-silabaj. Post miloj da jaroj la nesimetria oksilaba verso konservigis ne nur en la bulgara, sed ankaŭ en la pola kaj ĉeĥa popolaj poezioj (Ĉe la slovakoj estas preferata la simetria cezuro 4+4, en la serbkroata poezio la deksilaba verso).

La verspiedoj de nia kanto, traduke konservitaj, estas trokeo, 2 amfibrakoj, kun cezuro post la unua amfibrako.

Espereble, la legantoj de la kanto eksentos en ĝi ne nur la bulgaran, sed certagrade ankaŭ la antikvan prahindeŭropan spiriton.

Noto de la tradukisto

El la bulgara: Asen JOSIFOV

